

1979 julio – aŭgusto

72-a jaro


n-ro 883-4(7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Scienco kaj homa reproduktado

Vi trovos

ĉi tiun antaŭkongresan numeron sen mencio de la 64a UK en Lucerno. Ni ja mencias ĝin en la kutimaj enormaj kvantoj en nia septembra numero. Se vi ne aliĝis al la Kongreso en Lucerno, nun jam estas malfrue por fari tion, sed sufiĉe frue por komenci bedaŭri malĉeeston en kongreso, kiu promesas esti plurilalte unuaranga. Memoru, ke UEA lastatempe organizas nur sukcesajn kongresojn. Do, ne ripetu la lucernan eraron ankaŭ venontjare en Stokholmo (vi trovos aliĝilon por la 65a UK en nia septembra numero). Pretere dirite, se vi aliaj, kiuj venas al Lucerno, havos ion por komuniki al la redaktoro, serĉu lin ĉe la stando de la kongresa libroservo. Li "pendos" ie tie kaj verŝajne klopodos vendi tiujn librojn pri kiuj aperas tiel ampleksaj kaj tiel laŭdaj recenzoj en ĉi tiu revunumero.

Enhavo

- 121 Eksteraj rilatoj de UEA: Partopreno anstataŭ ĉeesto (S. Milojević)
Fondaĵo Evolulandoj: Tri subvencioj
- 122 Landa agado: Inter kiel Åberg
La lingvo: Vortoj de simplulo (Roger Bernard)
- 123 31a Kongreso de fervojistoj: Rave, kiel en la prospekto (Gernot Ritterspach)
- 124 Scienco: Perspektivoj kaj timo pri homa vivo kaj reproduktado (d-ro Leszek Kordylewski)
- 128 Agado E3: Lumo por Kamerunio (Jacques Tuinder)
- 129 Recenzoj: "Praktika bildvortaro de Esperanto" (G. Waringhien); "La turoj de l' ĉefurbo" (Probal Daşgupta); "La nova butikisto de Nukugaia" (E.V. Tvarožek); "Esperanto-makedona vortaro..." (J. Velebit); "El la 'Verda Biblio'" kaj "La knaboj de Paŭlo-strato" (W. Krikke); "Erevono, utopia satira romano" (D.B. Gregor); "Apontamentos de Esperanto" (R. Passos Nogueira)
- 134 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 135 Praktika utiligo de Esperanto: Necesas reagi
Volapuko 1879-1979: Deko da adeptoj por la centjariĝo (B. Golden)
- 136 TEJO-paĝo: Pola superrigardo; Varbado: Kiel kaj kien; Ankaŭ norvegoj (red. Ian Jackson)
- 137 Nekrologoj (D. Jeneckov, K. Schönrich, Venlo Fon)
Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 139 Ekzameno E (Bernard Golden); Oficiala informilo el la CO de UEA, Esperanto en radio (G. Larglantier)
- 140 Anoncetoj

La kovrilo

Ovo, eligita el musa ovodukto kaj rigardata per balaa elektrona mikroskopo JSM-35, kiu ebligis pligrandigon de la ovobildo 6000-foje. La originala diametro de la ovo egalas al 0,02 milimetroj. La kalva regiono sur la ova surfaco (maldekstre supre) estas verŝajne la akceptejo de la spermatozoo dum la fekundigo. Ĉar la ovo de ĉiuj mamuloj aspektas simile, ni povas imagi, ke ni rigardas foton de la unuaj momentoj de nia propra vivo. Fotis: R. Kujat, al kies afableco ni ŝuldas la publikigon de la foto, farita por kaj aperonta en la revuo "Biology of Reproduction", eldonata en Champaign, Illinois, Usono. Nu, dankon al la aŭtoro de nia scienca kontribuaĵo sur la paĝoj 124 – 127. Ni sendube fariĝis nekredeble pli kleraj pri nia propra vivo, kiu cetere dum ĉi tiuj tagoj estis en danĝero pro la sciencistoj, kiuj el la kosmo regalis nin per la ŝtala pluvo de la disfalanta usona kosma laboratorio. Feliĉe, ni sukcesis travivi por plue fidi la sciencistan pretendon mastri eĉ la homan vivon mem.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj entreprenoj kaj instancoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo, eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) 259 8821.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milanówek, Pollando; telefono (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-ino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario.

Partopreno anstataŭ ĉeesto

DUM la 17a Konferenco de Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj en Konsultaj Rilatoj (kategorioj A kaj B) kun Unesko, okazinta en Parizo inter la 18a kaj 22a de junio 1979, UEA elektiĝis kiel membro de la Konstanta Komitato de tiu grava internacia forumo. Ankaŭ en 1977 UEA kandidatis por tiu posteno, sed malsukcesis. Kion signifas la ĵusa elekto? Ĝi estas rekono de la aktiva rolo, kiun UEA ludas inter la internaciaj neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko. Tiu Konstanta Komitato gvidas kaj kunordigas la rilatojn inter la organizaĵoj kaj Unesko en la periodo inter la konferencoj, kiuj okazas ĉiun duan jaron. Ĉio ĉi signifas, ke la voĉo de UEA dum la sekvantaj du jaroj estos multe pli grava kaj pli laŭta, ne nur ĉe tiu internacia forumo sed ankaŭ ĉe Unesko mem.

La elekto estas kvazaŭ rekta sekvo de la rolo de UEA en alia grava aranĝo de la neregistaraj organizaĵoj. Temas pri la Simpozio "La rajto je komunikado", okazinta inter la 13a kaj 16a de marto ĉi-jare en Parizo. Ni menciis tiun Simpozion en nia maja numero, kie aperis (p. 87) tiu brila teksto de Claude Piron: "Kie la mitoj? Kie la realeco?", per kiu Piron enkondukis la unuan el la kvin sesioj de la Simpozio, en kiu reprezentigis pli ol 70 internaciaj organizaĵoj. Fakte, UEA mem iniciatis la Simpozion kaj tiu propono akceptiĝis fine de 1977 (v. nian numeron de februaro 1978, p. 37). Pere de sia Reprezenta Komisiono ĉe Unesko, gvidata de Emmanuel Chicot, UEA estris parton de la preparlaboroj por la Simpozio. En unu el tiuj preparaktoj partoprenis ankaŭ la prezidanto de UEA. Ĉio ĉi kondukis al la fakto, ke oni nun en la fina dokumento de la Simpozio trovas ankaŭ jenajn rekomendojn:

La Simpozio rekomendas 2) ke la esenca problemo de la kulturaj kaj lingvaj aspektoj de komunikado, je ĉiuj niveloj, estu studata en la kadro de Unesko kaj la internaciaj neregistaraj organizaĵoj, kies rolo estas ne malhavebla; 3) ke ĉiu solvo devus konsideri jenajn faktorojn: i) respekto kaj protekto de diversaj kulturaj kaj lingvaj identecoj, kun konservado de la gepatraj lingvoj; ii) lingvaj egaleco kaj nediskriminacio – tiel internacie, kiel ankaŭ ene de plurlingvaj ŝtatoj – kaj serĉo de rimedo por interkompreniĝo; . . . vii) . . . Studoj kaj agado rilate subtenon al adopto kaj utiligo de lingvo, kiu estus reala instrumento de vera internacia komunikado; . . . (Laŭ Fina Raporto ONG/79/20/COM de la 23a de majo 1979).

La rekomendojn de la marta Simpozio aprobis la juna Konferenco – unuanime – kaj ĝi adoptis novan rezolucion, kiu instigas al plua atento al la rajto je komunikado, inkluzive la lingvan aspekton de la demando. En la forumo de la neregistaraj organizaĵoj kaj ĉe Unesko mem, la reprezentantoj de UEA ĉiam pli firme prezentigas kiel specialistoj pri la lingvaj aspektoj de komu-

nikado kaj lingva dimensio de la homaj rajtoj. Tial UEA estis invitita kaj partoprenis ankaŭ en kunveno de ekspertoj pri la edukado rilate la homajn rajtojn, okazinta inter la 25a kaj 28a de junio en Parizo.

Se la supre cititaj eroj el la rekomendoj de la marta Simpozio estus fragmento el iu rezolucio de Universala Kongreso de Esperanto aŭ alia movada kunveno, ili ne estus atentinda novaĵo por Esperanta gazeto. Ni ja havas abundon da tiaj rezolucioj en la Movado mem. Ni jam plene konvinkis nin mem pri la taŭgeco de Esperanto por solvi la lingvoproblemon de la mondo. Konvinki la aliajn, instigi ilin adopti movadecajn rezoluciojn kaj ekrigardi la lingvoproblemon kvazaŭ per niaj okuloj, tio estas la granda tasko de la nuntempa Esperanto-movado. Tial la cititaj rekomendoj de la pariza Simpozio estas granda novaĵo, kaj ne simple unu plia "enuiga" rezolucio de profesiaj kunvenistoj kaj rezoluciistoj en la internacia sfero.

Alia grava fakto pri la cititaj rekomendoj estas, ke la plej rekta, plej forta aludo al Esperanto – tiu en la fino de la citaĵo – ne venis de la reprezentantoj de UEA en la Simpozio, sed ĝin proponis alia internacia organizaĵo. Jen kial UEA tiel aktive partoprenas la laboron de tiuj forumoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj. Oni informas, oni kvazaŭ edukas la aliajn pri niaj propraj starpunktoj kaj intereso. La aliaj komencas faradi niajn proprajn proponojn. Tio havas pli da forto, ol kiam UEA mem pledas por siaj starpunktoj. UEA dum la lastaj jaroj ĉesis simple ĉeesti kaj sidi en tiuj internaciaj kunvenoj. Ĝi komencis aktive partopreni kaj foje eĉ ĉefroli.

FONDAĴO EVOLULANDOJ:

Tri subvencioj

LA ESTRARO de la Fondaĵo Evolulandoj, konsistanta el Renato Corsetti (Italio), Senad Čolić (Jugoslavio) kaj Kurt Greutert (Svislando), decidis aljuĝi jenajn subvenciojn:

Bona Espero, infana Esperanta komunumo en Brazilo, ricevos 1 000,00 guldenojn por aĉeto de multobligilo. Subvencio de 2 000,00 guldenoj helpas la eldonon de **Albana ŝlosilo de Esperanto**, verkita de Usni Zenoski. Monsumo de 1 000,00 guldenoj subtenos la eldonon de **Korea-Esperanta vortaro**, verkita de So Gilsu.

La decido estis farita post atenta konsidero de ĉiuj subvencipetoj reage al la alvoko aperinta en nia maja numero pasintjare (p.93). En la konto de la Fondaĵo, kiun starigis la Komitato de UEA dum la 61a UK en Ateno, restas ankoraŭ iom pli ol 2 600, 00 guldenoj.

Inter kiel Åberg

INTER — Agadgrupo por Esperanto, en Gotenburgo (Svedio), apenaŭ estas grupo, sed ke ĝi jam tra pluraj jaroj tre vigle agadas — pri tio ekzistas nenia dubo. Supozeble, la grupon konsistigas nur la geedza paro Aino kaj Lennart Åberg. Tamen, tio kion la agadgrupo sukcesas fari ĉiujare — precipe sur la informa kampo pri Esperanto — ofte egalas al la rikolto de bone funkcia landa asocio. INTER havas mirindan entreprenon, konas la ĝustajn vojojn, tenas utilajn kontaktojn, malkovras ekspluateblajn temojn kaj aranĝojn, trovas valorajn kunlaborantojn kaj posedas nekutiman organizan talenton. Se ĉio ĉi kuniĝas en unu grupo aŭ eĉ unu homo, eblas tiam atingi maksimumon el minimumo homforta.

En decembro pasintjare (p. 221), ni notis la prelegvojaĝon de pastro Albino Ciccanti (Italio), kiu invitive de INTER faris en oktobro kaj novembro 1978 entute 49 prelegojn en Svedio, ĉiujn en Esperanto, pri nemovada temo. Nun INTER raportas pri la dua parto de la sama prelegserio, okazinta inter la 12a de marto kaj 9a de aprilo 1979. Ĉio kune, en 1978 kaj 1979, pastro



S-ro Gabriel Romanus, sveda ministro pri socialaj aferoj, inaŭguris la ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, organizitan de INTER.

Foto: Göteborgs-Posten

Ciccanti faris en Svedio 73 prelegojn antaŭ proksimume 4 200 personoj, ĉefe gimnazianoj kaj instruistoj. Preskaŭ ĉiujn prelegojn — pri Sankta Francisko el Asizo — sekvis vigla interparolo kun la publiko, ofte

LA LINGVO:

Vortoj de simplulo

MI NE KOMPRENAS. Mi demandas min, kial nuntempe tiom da t.n. adeptoj de la lingvo Esperanto, ofte ne la malplej elstaraj, dediĉas tiom de sia tempo kaj talento por okupiĝi pri tiuj mortnaskitaj insektoj, nome: lingvoprojektoj aŭ planlingvoj, ekz. volapük, ido, interlingua, occidental, kaj aliaj el la sama barelo, kun la risko doni al la publiko la impreson, ke vivas tiuj larvoj, kaj risko sekve endanĝerigi la pozicion de Esperanto. Kun kia ŝajne rava plezuro ili dissekcas tiujn kadavrojn, anstataŭ eluzi sian talenton al studado de la nerefuteblaj valoroj de Esperanto, al ĝiaj eble ankoraŭ ne ekviditaj latentoj, aŭ tute simple al polurado kaj perfektigado de la lingvo per abunda verkaro ne interlingvistika. Tiuj doktaj personoj igas min pensi pri tiuj sciencistoj, kiujn entuziasmigas la studado de la erotikaj impulsoj ĉe la amebaj... Ne! Estimataj sinjoroj, Esperanto vivas, milfoje pruvis sian taŭgecon, kaj ne bezonas komparon kun palaj ektoplasmaj. Mi vere petas vin, deturnu vin de vanaj kaj senutilaj esploroj; viajn kapablojn dediĉu al io pli inda je vi. Ĉu mi diru anticipan dankon?

Dume, aliaj homoj, kaj eĉ akademianoj (!), tiklataj de mi ne scias kia inventemo, proponas (denove!) ŝanĝon

de la ortografio, per enkonduko de "q,w,x,y" (ĉu ĉiuj, ĉu nur parte, ĉar iliaj sistemoj ne ĉiam estas similaj), tiel volante doni al Esperanto la finan kvaliton, kiun ĝi laŭ ili ankoraŭ ne posedas por venki la mondon. Ilia ĉefa argumento estas la laŭdire malutilaj ĉapelitaj literoj. Nu, mia preskaŭ kvindekjara prezento de la fakto "Esperanto" al multnombraj homoj: parencoj, amikoj, grupoj aŭ societoj, montris al mi, ke, se ĉiuj agnoskas la utilecon de Esperanto por solvi la lingvajn barojn, ili tamen, krom en tre malofta escepto, ne lernas ĝin, preferante baraktadi per sia aborta scipovo de unu aŭ du fremdaj lingvoj. Sekve, tute ne ĝenas ilin, kaj ankaŭ ne la finan venkon de Esperanto, la uzo de la ĉapelitaj literoj. Tiuj literoj cetere ne malhelpis dum pli ol 90 jaroj la eldonadon de miloj kaj miloj da verkoj en nia lingvo. Unu sola ekzemplo: kiam mi eldonis proprakoste la du teatraĵojn de Sartre de mi tradukitajn, mi turnis min al amiko, posedanto de tute negranda presejo, kaj li tre facile kaj malmultekoste povis akiri la necesajn litertipojn.

Kial do senutile atenci la Fundamenton, kaj senfine prokrasti la iam venontan sukceson de la solvo, kiun ni prezentas al la mondo? Reformemuloj haltu en sia

demandanta ne nur pri la temo de la prelegoj sed ankaŭ pri Esperanto en kiun estis interpretitaj la prelegoj kaj la interparoloj. Interpretis Lennart Åberg (aŭ INTER, se vi preferas nomi lin tiel). Pastro Ciccanti ne faris nur tiujn 73 prelegojn en Svedio, li renkontiĝis tie kun episkopoj, prezentiĝis al ministro kaj Sveda Komisiono de UNICEF, plurfoje intervjuiĝis por la gazetaro kaj radio kaj estis ĉiupaŝe utila por Esperanto, kiel INTER jam kapablas organizi tiajn vizitojn.

Fine de majo ĉi-jare, INTER invitis alian gaston al Svedio. Temis pri Grahame Leon-Smith, prezidanto de Brita Esperanto-Asocio. Li prelegis en kvin rotariaj kluboj en Gotenburgo kaj ĉirkaŭaĵo, ĉar Leon-Smith prezidas ankaŭ la fakan organizaĵon Internacia Esperanto-Amikaro de Rotarianoj. Li parolis ankaŭ en la jara kongreso de Sveda Esperanto-Federacio kaj faris plurajn vizitojn kaj interparolojn kun funkciuloj en la sveda eduksistemo (Universitato de Gotenburgo, instruista altlernejo, gimnazio ktp).

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, en aprilo ĉi-jare, post ampleksaj preparlaboroj, INTER organizis tre imponan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Al la inaŭguro venis la sveda ministro pri socialaj aferoj kaj pluraj aliaj altranguloj de la sveda publika vivo. Nu, estu eĉ INTER kiel Åberg aŭ Åberg kiel INTER, sed ili ambaŭ sinonimas la agadon kaj entreprenemon.

malutila laboro, kaj ili alimaniere laboru por la celo, verŝajne komuna al ili kaj al centmiloj da aliaj, kiujn tute ne ĝenas la ortografio de Esperanto.

Roger Bernard

membro de la Akademio de Esperanto

REDAKCIA NOTO: Estas multe da pravo en la spritaj "Vortoj de simplulo", kiel Roger Bernard (multjara sekretario de la Akademio) mem titolis la ĉi-supran tekston. Ni nur parte konsentas kun liaj pensoj en la unua alineo de la teksto, kiujn ni kvazaŭ provas dementi aperigante aliloke en ĉi tiu numero artikolon pri volapuko. Ni aliĝas al tiuj, kiuj opinias, ke la esperantistoj devus esti almenaŭ supraĵe informitaj pri la plej gravaj projektoj, kiuj antaŭis la Internacian Lingvon. Aliflanke, ni kun danko apogas la pensojn de Bernard rilate la svarmon de ortografiaj reformemuloj. Ankaŭ en niaj tirkestoj kuŝas pluraj tiaj reformprojektoj. Regas ia stranga ortografia epidemio en la Movado! Kurioze tamen, ke ĉiuj ĉi projektoj venas de okcidentanoj, kiuj forĝesis lerni kaj kutimiĝi, kaj anstataŭe preferus superece regi kaj trudi siajn nacilingvajn ortografiajn "juvelojn" al la zamenhofa lingvo. Almenaŭ du el tiuj reformemuloj pretis aĉeti plurpaĝan anoncospaĉon en nia revuo, por reklami siajn proponojn. Ni ne pretaŭ vendi tiun spaĉon. Tiuj, kiuj ne ricevis nian respondon ĝis nun, konsideru ĉi tiun noton kiel respondon. Ni jam komencas ami la "mankojn" de la Esperanta alfabeto. La reformprojektoj do iru en la arkivan polvon.

31a KONGRESO DE FERVOJISTOJ:

Rave, kiel en la prospekto

INTERNACIA Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) kongresis en Turku (Finnlando) de la 15a ĝis la 21a de junio, sub aŭspicio de FISAIC (internacia federacio de kulturflegantaj fervojistoj), kies prezidantaro samtempe kaj samloke jarkunvenis. Venis 354 personoj el 20 landoj. Pro la preskaŭ ĉiama sunbrilo, kun marventeto, ĉio sin prezentis tiel rava kaj vidinda kiel la esperantlingva prospekto promesis: la haveno kun vigla ŝiptrafiko, la moderna kongrescentro Ikituuri, apuda favorpreza "somera hotelo", mezepoka kastelo komune vizitita, malnova katedralo kaj la kvartalo el lignodomoj pasintjarcentaj, larĝegaj stratoj kun bonega aŭtobusa servo, — por mencii nur kelkajn el multaj detaloj.

En la inaŭguro, pli ol kutime aŭdiĝis "fremdaj" lingvoj, eble pro la ĉeesto de la FISAIC-prezidantaro, kvankam Marcel Bisch (Parizo), anstataŭanto de FISAIC-prezidanto, parte uzis la Internacian Lingvon. Li diris i.a., ke ni homoj mutiĝas ĉe landlimaj transiroj, ĉar mankas al ni tia aŭtomata lingvoŝanĝilo, kian la fervojoj posedas por ebligi al vagonoj la senĝenan transiron de unu ŝpursistemo al alia... Longa estis la vico de parolantoj, kiun komencis LKK-prezidanto mag. Nils Gösta Narvala kaj en kiu pleje eminentis la ĉefdirektoro de la Finnaj Ŝtatfervojoj, Herbert Römer. IFEF-prezidanto Joachim Giessner (Germanio) citis el la Fina Akto de Helsinko, ke neniu spertu diskriminacion pro sia lingvo. Tial Esperanto devas ekkapti sian grandan ŝancon. "La Internacia Lingvo ne ŝanĝos la karakteron de la homoj, sed ĝi povas multe influi la kontaktojn inter ili. Sendube regus pli da paco, se ĉiuj praktikus ĝin anstataŭ nur paroli pri ĝi..."

Jam en sia malferma parolado J. Giessner elstarigis la gravecon de la klopodoj pri faka klerigo kaj pri evoluo de nia terminologio. Kun specifa trafikrealigo de la gastiganta lando en la kadro de kombinita vartrafiko konatigis nin helpe de diapozitivoj kaj filmo la prezidanto de LKK N. G. Narvala: "La Kompanio Railship kaj la teknika realigo de transmara vagontransporto inter Hanko kaj Travemünde." Antaŭe mag. Gvozden Sredić (Jugoslavio) elokvente prezentis la ĝeneralan vartrafikon, kaj precipe la konteneran branĉon, kiu estas lia agadkampoj ĉe Intercontainer en Basel (Svislando). La Fakprelega Komisiono de IFEF kunsidis pri venontjara programo, kaj la Terminara Komisiono eĉ dufoje kunvenis por diskuti la efektivigon de sia laborplano kaj konkretajn terminologiajn problemojn. Okazis ekskurso al fervojaj riparejoj kaj muzeoj.

Ampleksa tagordo atendis la Komitaton: el 7 proponoj 5 celis ŝanĝojn en la Statuto aŭ Regularo. Menciindas jenaj decidoj: pli klara voĉdona proceduro, ebleco de amendoj al kongresproponoj, la kotizo estas plialtigita,

membreco kaj abono de la federacia organo restas ne-disigeblaj. Reelektitaj estis la ĉefkomitatano Lucien de Sutter (Belgio) kaj la funkciuloj de la Terminara Komisiono: inĝ. Sekereš (Jugoslavio) kaj Ritterspach (Germanio); la novelektitoj de la Fakprelega Komisiono nomiĝas Thuesen (Danlando) kaj Ritterspach. Malfacilaĵoj pri la membreco en nepagipovaj landoj daŭras. La venontjara kongreso okazos en la nederlanda urbeto America (inter Eindhoven kaj Venlo), sekvos en 1981 Regensburg (Germanio), kaj en 1982 Hungario. Salut-telegramo al la finna Ŝtatprezidanto Urho Kekkonen estis sendita, kongresa rezolucio akceptita.

Dum Kultura Vespero, prezentita de la finna FISAIC-sekcio VRHH, agis ekskluzive fervojistoj: harmonika ensemblo, popoldanca grupo, ĥoro, blovorkestro. Dum la sama vespero, Wim van Leeuwen (Nederlando), vic-prezidanto de IFEF, ricevis Oran Medalon de FISAIC.

Tre altnivela fariĝis ankaŭ la Arta Vespero. El la finna nacia epopeo *Kalevala* geaktoroj de la Esperanto-societo de Turku prezentis parolĥore fragmenton. Kompletaj tekstoj en la internacia kaj la finna lingvoj en preskaŭ ĉies manoj plifaciligis la komprenon kaj ĝuon de la multtalente prezentita teatraĵo. Muzikis harmonikludistoj, geknaba grupo prezentis dancojn kaj kantludojn el Karelio, Kerttu Veitonmäki aŭdigis internaciajn kaj finnajn ariojn, 6 knabinoj montris gimnastikon kun ringoj, kaj virina trio kantis esperantlingve. Fragmenton el la teatraĵo *La fervojo* de la finna klasikulo Juhani Aho (1861-1921) prezentis 5 geaktoroj, atingante per minimumo da surscenejaj objektoj maksimuman impreson. Per festpolonezo, fortepiane ludita de la komponisto Reima Viinamäki, brile finiĝis tiu vespero.

Serio da lumbildprezentadoj kaj prelegoj aparte menciindas: profesoro Petro Nuez (li instaligis en la universitato de Turku per prelego pri la Internacia Lingvo) prezentis "galerion de pentristoj" (Cranach, Rubens, Goya, Degas) kaj prilumis sub la titolo "Nur homo" la familian vivon de la juna Zamenhof. Interesajn detalojn pri la universitato de Turku kun nuntempe 9 000 gestudentoj ni eksciis de prof. Heikki Alikoski (multjara asistanto de la konata astronomo, fizikisto kaj esperantisto, prof. Y. Väisälä).

Ekskursoj ne povas manki en tutsemajna kongreso. Naantali, iama kuraĉloko, poste komerca nodo ĉe la okcidenta marbordo, estis la celo de duontaga aŭtobusekskurso. Alia ekskurso, duone per ŝanceliĝema ŝipeto duone per aŭtobuso, celis la arkipelagon sude de Turku. Lasta tago — tuttaga ekskurso. Post la jam menciita vizito de la fervoja muzeo en Jokioinen sekvis vizito tra la vitrofabriko Iittala kun tutmonde konataj produktoj. La vasta naturparko Hämeenlinna kun la turista restoracio Aulanko estis agrabla finpunkto. Postkongresa vojaĝo kondukis al la laponia ĉefurbo Rovaniemi, kie multifaceta folkloro programo estis preparita. Reveture multaj kongresintoj haltis, ĉu en Helsinki, ĉu en Lahti, ĉu en Leningrado, ĉu aliloke.

Gernot Ritterspach

SCIENCO:

Perspektivoj kaj pri homa vivo kaj

TRA sia kultura historio la homaro atribuis magian signifon al certaj nombroj. Sep, dek tri aŭ aliaj estis elektataj, ofte rezulte de la observado de la fenomenoj de la nevivanta naturo. Ne estas, tamen, vaste konsciate, ke ĝuste **du** havas esencan signifon en la viva naturo, priskribata de biologio.

La rolo de du: $1 + 1 \rightarrow 1$

La genia "eltrovaĵo" pri la vivanta substanco estas la fakto, ke ĝi ekzistas en formo de unuoj: ĉeloj. Ĉiu el ili kapablas konduki la tuton de la vivaj procezoj, sed nur en la kazo de la plej primitivaj organismoj (protozooj, algoj⁵) ili funkcias kiel memstaraj organismoj. La granda varieco de la vivformoj eblas dank' al la ekzisto de la multĉelaj individuoj. Kvankam la pruvon pri tio ni ne ĉiutage vidas, la homo estas unu el ili. La funkciado kaj la aspekto de la individuo konsistas el sumo de la funkcioj kaj trajtoj de ĝiaj ĉeloj. Nature, la tuto havas pli da avantaĝoj ol la unuopaj eroj. Estas tamen neordinare mirinde, ke ĉiu tiel komplika kaj perfekta individuo disvolviĝas el la unuopa ĉelo. La kovrilbildo montras ĝin rigardata per *skaniga** elektrona mikroskopo.⁴ Ĉe la komenco de ĉies individua vivo estas unu ĉelo nomata *zigoto*. Ĝi transformiĝas en la multĉelan korpon aplikante ĝuste la "magian" duon: ĉiu unuopa ĉelo dividiĝas je **du** idaj ĉeloj. La novaj estas ĝemele similaj; ili enhavas la identan genetikan informon. Ĉi tiun akuratecon gardas la komplika mekanismo de la dividiĝo de la ĉelnukleo: la *kariokinezo*.⁷ La gardistoj estas la *kromosomoj*, kiuj antaŭ la kariokinezo aperas en paroj po **du**, kaj poste ĝi dividiĝas, ĉiu je **du** idaj. Se ni enrigardos pli profunden en la plej esencan kromosoman eron — la nuklean acidon *DNA*, ni ekrimarkos, ke ĝia fama *helico* konsistas el **du** fibroj. Splitiĝante je **du** apartaj fibroj ĝi replikiĝas tiel, ke du novaj helicoj aperas, el kiuj ĉiu konsistas el du komplementaj *DNA*-fibroj. *DNA*-molekulo alivorte estas gen-ĉeno. Ĉiu trajto de la organismo estas kodita per **du** similaj genoj nomataj *aleloj*, sidantaj ĉiu en unu el **du** homologiaj kromosomoj.¹¹

Post la ĉeldividiĝo ne eblas distingi kiu el la du ĉeloj estas pli "gepatra" kaj kiu pli "ida". Sen morto la vivo de la unuopa ĉelo finiĝas ĉe la transformiĝo de la ĉel-

* La neologismo *skaniga* staras ĉi tie por difini tiun specon de elektrona mikroskopo, kiu uzas maldikan faskon de elektrajn radioj, por kvazaŭ balai la surfacon de la objekto kaj, en ĉi tiu kazo, per reflektaj formi la bildon. Se la termino *balaa* ne plene konvenas anstataŭ *skaniga*, ĉu konvenus la esprimoj *surfaca* aŭ *netrapasa*?




timom reproduktado

korpo en **du** novajn ĉelojn. Jen estas la kazo de siaspeca senmorteco, kiu trafluas de generacio al generacio de ĉeloj. Tamen iuj ĉeloj estas pli vivecaj, vigle reproduktiĝantaj, dum la aliaj, kvankam meritaj pro sia specialigo, estas bedaŭrinde kondamnitaj je nerevokebla morto. Rezulte de tio la multĉelaj individuoj ne povas esti senmortaj. Pro sia komplikeco ili pagas la prezon de la limigita ekzistotempo. Sed, antaŭ ol esti detruitaj, ili havas ŝancon! Ili povas reproduktiĝi formante novajn individuojn: siajn idojn. Denove, nur la plej primitivaj organismoj kapablas memstare formi la idojn

nekomprenebla evento povus esti klarigita per enmiksiĝo nenatura.

Kiel kariokinezo gardis la neŝanĝeblecon de la genetika informo transdonata de unu al alia generacio de ĉeloj konstruantaj la korpon de unuopulo, tiel fekundigo estas la okazo enkonduki en la genaron de la ida individuo la kombinaĵon de genoj de ĝiaj **du** nesamseksaj gepatroj. Tiel do **du** seksoj, **du** seksaj ĉeloj, regule **du** postkariokinezaj ĉelidoj, po **du** homologiaj kromosomoj, po **du** aleloj kaj **du** fibroj en DNA-helico garantias la normalan "senmortan" ekziston de la viva substanco kaj ĝian naturan evoluon.

Sed, lastatempe ĉia natureco estas en danĝero. La progreso de la scioj kaj la evoluo de teknikoj puŝis la homon peni pri ĝisnunaj neatingaĵoj. Jam ne necesas konstrui Babelturon por atingi la ĉielon; la piedoj de astronautoj jam surprenis ĝin. Maŝinoj kaj konstruaĵoj formangas la naturajn terenojn de nia planedo. Laste, la manoj de medicinistoj kaj biologoj provas manipuli per la kreoprocezo de la vivo... Kiujn avantaĝojn alportos la eksperimentoj aŭ kion riskas per ili la homa-



de sia propra korpo. Tiun metodon de reproduktado oni nomas *senseksa* (Desegnaĵo 3).

Por la plimulto de la komplikuloj la unusola vojo ekhavi idon kondukas pere de duoble dividiĝanta ovo. Por ke la ovo estu kapabla komenci sian eriĝon necesas la apliko de la "magia" **du**: necesas la kuniĝo de **du** seksaj ĉeloj – la ina ovo kun la malina spermatozoo. Ĉi tiu procezo nomiĝas *fekundigo** (Desegn. 1), kaj tiel la ovo transformiĝas en la disvolviĝkapablan zigoton.

La nura natura escepto de la supra regulo estas *partenogenezo* (Desegn. 2). Temas pri la normala disvolviĝo de la nefekundigita ovo. Ĝi funkcias ekz. ĉe apero de virabeloj aŭ inter aliaj amase reproduktiĝantaj insektoj. Ĝis nun oni raportas pri nur unu kazo de partenogenezo rilate al la homo: la naskiĝo de Kristo. Tiu escepte

* La aŭtoro de ĉi tiu teksto uzas la terminon *fertilizo*, kiun la redakcio opiniis nenecesa neologismo kaj sekve anstataŭigis ĝin per *fekundigo*. Tamen, la neologismo *fertilizo* restas en la desegnaĵoj (faritaj de la aŭtoro mem), ĉar estis teknike mal-facile fari ŝanĝojn en la desegnaĵoj.


ro? Sciencistoj eksperimentas – ĉu vere sukcesaŭgure? Kaj, ĉu la homo, la plej alte evoluinta estaĵo de ĉiuj vivuloj, rajtas esti eksperimenta besto?

Bebo el provtubo: 2 + pluraj → 1

En junio 1978 la presagentejoj anoncis la sensacion: en Oldham, Anglio, naskiĝis la unua infano el provtubo. Fakte, la informo estis multe troigita. La malgranda Louisa Brown naskiĝis tute nature kaj ankaŭ la egan plimulton de la gravedperiodo ŝi pasigis normale en la utero de sia patrino. Nure la komenco – la fekundigo okazis nenature, ekster la homa korpo. La ovo prenita de la patrino korpo estis "en vitro" kunigita kun la spermatozoo de ŝia edzo (Desegn. 4). Tion faris du britaj sciencistoj, d-roj Patrick Steptoe kaj Robert Edwards, por helpi al la patrino, kiu pro la nekonduktiveco de ovoduktoj neniam estus havinta bebon. Ili transplantis la disvolviĝantan zigoton reen en la uteron de la patrino, kies organismo feliĉe akceptis la junan embrion. Tiel la blokita vojo tra la ovo-

duktoj estis evitita kaj kondukis ĉirkaŭire tra la provtubo. Por sukcese realigi la operacion oni devis perfekte imiti la naturajn kondiĉojn de la virinaj oviduktoj en vitra ujo. Oni riskis difektiĝon de la embrio, sed ĉi-kaze naskiĝis normala infano.


Ĉu la priskribita operacio signifas novan kuracmetodon aŭ ĝi estas eksperimento? La unua — el la vidpunkto de la patrino, la dua — el tiu de la infano. Ja ĝi dum kelka periodo troviĝis en artefaritaj kondiĉoj. Neniu povas garantii ilian identecon kun naturaj kondiĉoj de la virina utero. Ĉu la arta medio estas havanta neniun influon je la embrio? La fakto, ke la mistero de la vivo-kreo, ĝis nun kaŝita en la intimeco de homaj emocioj, evidentiĝis tiel simpla kaj teknike ripetebla kiel ekz. injekto, povas instigi sciencistojn al intensaj esploroj por respondi la supran demandon. Jen kia tento por la sciencisto iom modifi la medion, plibonigi ĝian konsiston sub la preteksto perfektigi la metodon, enkonduki farmaciaĵojn, radiadon aŭ alispecan faktoron kaj noti la rezultojn de ilia influo sur la disvolviĝon. Kiom da progresemaĵoj de doktoriĝdisertacioj oni havas la



traĵtojn. Ĉi-kaze temis pri la identa duplikato de la "patro".

La metodo fari tion estas prilaborita kaj rutine aplikata ĉe amfibioj.⁶ Ĉiu korpa ĉelo de la individuo enhavas en sia nukleo la saman, kompletan genetikan informon. Sufiĉas nur transplanti iun el la korpĉelaj nukleoj en la ovon, kies propran nukleon oni forĵetas, kaj stimuli tiel preparitan "zigoton" al normala disvolviĝo (Desegn. 5). Kreiĝas *klono* — kompleta individuo kun la trajtoj de la nukleodonanto. Ĝi efektive ne estas lia ido, sed pli ĝuste iaspeca pli juna ĝemela frato.


La scienca mondo tre skeptike akceptis la raporton de Rorvik, opiniante ĝin nerealigebla absurdaĵo. Eĉ se ĝi ankoraŭ ne estas vera, ĉu Rorvik ne volis averti la mondon, ke ĝi povus realiĝi? Se eblus kloni homon, tiam nur unu paŝo kondukus al la amasa produktado de identaj individuoj kun elektitaj karakterizaĵoj. Sed, kiujn trajtojn elekti? Ĉu ni bezonus ĉarmajn kopiojn de filmstelulinoj? Aŭ eble Einstein-similajn geniulojn? Aŭ abelsimilan svarmon de militemaj fortuloj ...? Jen alloga perspektivo tiel plibonigi la homan genton! Sed, ĉu ni vere bezonas tian plibonigon? Prof. Waclaw Gajewski, eminenta pola genetikisto diris: "Ni povus plibonigi la naturon, se ni havus bonan modelon por fari tion. Sed ja la plej bona modelo, elprovita dum milionoj da jaroj de la evoluado, estas ĝuste la **varieco**."³





okazon inventi! La afero aktualas des pli, ke oni raportas pri pliaj naskiĝoj de la artkreitaj infanoj. Kaj, kiom da tiel eksperimente koncipitaj infanoj jam malsukcesis naskiĝi? En la sesdekaj jaroj la rezultoj de Petrucci kulturi la homan embrion estis ignorataj kaj primokataj. Lia filmo montranta la disvolviĝon de la homa embrio estas taksata kiel falsaĵo. Liaj eksperimentoj ĉesiĝis verŝajne pro la timo krei monstren. James Watson, la malkovrinto de DNA kaj Nobelpremiito, parolante iam antaŭ la Usona Kongreso, diris: "Per la naskiĝo de la infano koncipita en provtubo ni povas malfermi la pordegon de l'infero."³

Klonfarado: 1 el 1

Komence de 1978 la mondo estis ŝokita de alia evento. Jen en Usono aperis libro de David Rorvik⁹, en kiu li raportas pri alispeca sukcesa eksperimento kun homo. Anonima milionulo financis la kreon de sia identa kopio. La infano kreskas normale, kvankam ĝi ne disvolviĝis el virina ovo fekundigita de spermatozoo. Kiel jam estis dirite, la fekundigo rezultigas individuon genetike diferencon de la gepatroj, enhavantan novajn





Surogataj patrinoj: $1 + 2 \rightarrow 1$

Amfibioj ne bezonas gravedecon; iliaj zigotoj normale disvolviĝas en akvo. Por ke la homa klonado naskiĝu necesas virino, en kies utero ĝi pasigus la gravedotempon. Ŝi ankaŭ estus donanto de la ova sennukleigita citoplasmo (Desegn. 5, 1-2).

La transplantado de la fekundigita ovo en la uteron jam estas teknike mastrata. Sed la fekundigita ovo ne nepre devas esti transplantita en la saman inon, kiu ĝin produktis (Desegn. 6). Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenis en la eksperimentoj de la scienca grupo de profino Kardymowicz el Krakova Zootehnika Instituto.² La ovoj de ŝafinoj de altvalora raso fekundigitaj de samrasaj virŝafoj estis transplantataj al ordinara ŝafinoj. Nature, la primitivaj inoj naskis altvalorajn idojn, dum la valoraj gendonantinoj ne perdis la tempon por gravedo, sed dume povis ĉiumonate produkti novajn altvalorajn ovoj. ^{1,10}

Jen la ŝanco por virinoj, kiuj pro la difekto de utero ne povas mem naski infanon; kaj ankaŭ ŝanco por la aliulinoj, kiuj pro la difekto de ovario ne povas ovprodukti, sed povas naski. Tamen, kiu el ili estos vera patrino? Ĉu la gendonantino? Ĉu la naskantino?

Parta reunigo de la korpo: ero el 1

La kombino de la supre priskribitaj metodoj kondukas al la ŝokaj eblecoj. La suba eksperimento estas simpla en teorio; laŭ onidiro oni jam sukcese faris ĝin kun musoj en Svislando (Desegn. 7).³

Oni preparis klonan embrion uzante la korpĉelan nukleon kaj la ovan citoplasmon de la sama musa ino. La embrio pasigis normalan gravedotempon en la utero de sia genetike identa patrino. Tial do ĝi samtempe estis ido kaj kvazaŭ ĝemelo. Kiam ĝiaj organoj jam plenumiĝis, oni operacie forigis de la utero la korpon de la embrio, krom ĝia difinita organo, ekzemple koro. Memkompreneble tio signifas bagatelajn: mortigon de la ido. Post la fino de la gravedeco, anstataŭ idon la patrino naskas... junan koro. Ĝi uzeblas kiel ĝia rezerva koro, genetike identa al la propra. La junan koro oni povas enplanti anstataŭ la difektita malnova,

ĉar la imuna sistemo de la organismo rekonos ĝin kiel la propran. Fantazio? Eble. Sed eble ankaŭ perspektivo por solvi la transplantorganajn problemojn.

Konkludo

La priskribitaj fenomenoj, eksperimentoj realigitaj aŭ planataj, povas elvoki entuziasmon aŭ abomenon. Ili povas signifi progreson de la homa scio aŭ regreson de la homa moralo. Neniu scias kien kondukas nin la sciencaj rezultoj. Ankaŭ neniu povas haltigi la homan scivolemon kiu inspiras sciencajn studojn. Ni tamen devas esti singardaj, por ke la enmiksiĝo de pluraj aliaj faktoroj krom la **du** gepatraj, nature rajtigataj por esti envolvitaj en la generadon de la vivo, ne turniĝu kontraŭ la naturaj principoj de l'homeco. Estas do esence grave, ke la eksperimentoj okazu sub la socia kontrolo kaj kun la socia aprobo.

D-ro Leszek Kordylewski
Krakovo, Pollando

BIBLIOGRAFIO

1. Betteridge, K.J., Embryo transfer in farm animals. A review of techniques and applications. Canad. Departm. Agriculture. *Monograph* No 16, 1, 1977.
2. Kardymowicz, O., Storage of fertilized mammalian ova at low temperatures. *Roczniki Nauk. Zootech.* PWN Warszawa-Wrocław, 1, 1-60, 1975.
3. Konarzewska, W., *Pieknelne eksperymenty*. Literatura. Warszawa. VII, 40, 1978.
4. Kordylewski, L., Uzo de SEM (Skaninga Elektronmikroskopio) por observi vertebrulajn embriajn histojn. *Medicina internacia revuo*, 8,2, 41-44, 1978.
5. Lewin, R.A., *Enkonduka kurso pri algoj*. SUK, Liège 1974. Ne aperis libroforme.
6. McKinnel, R.G., *Cloning; Nuclear Transplantation in Amphibia*. Univ. Minnesota Press. Minneapolis. 1978.
7. Mészáros, B., *La nuntempa ĉelkariologio kaj citotaksonomio*. SUK, Liège 1976.
8. Oka, H., *Senseksa reproduktado de animaloj*. SUK, Liège 1974. Ne aperis libroforme.
9. Rorvik, D., *In his image; The cloning of a man*. Lippincott NY, 1978.
10. Smorąg, Z., Wierzchoś, E., Transplantacja komórek jajowych u bydła. *Przegląd hodowlany*, 45, 5, 15-17, 1977.
11. Støp-Bowitz, C., *Bazaj nocioj de biologio*. SUK, Liège 1972.

Lumo por Kamerunio

EN NOVEMBRO 1966 aperis en *Espero* katolika artikolo "Blindeco en Afriko", kiu informis pri milionoj da blinduloj en la Tria Mondo, kiuj estas **nenece** aŭ **hazarde** blindaj: "ili povus vidi, se oni donus la necesan helpon pere de operacio kaj medikamentoj!" Pere de la sama periodaĵo, la aŭtoro de ĉi tiu teksto, nederlanda social-helpisto, proponis al la membroj de IKUE, ke ili redonu la lumon al almenaŭ mil afrikaj blinduloj, subtenante tiurilatan programon de Fondaĵo prof. d-ro H.J.M. Weve, institucio kies celo estas havigi oftalmologian asiston en evolulandoj.

Tio estis la modesta komenco de modesta porblindula kampanjo, kiu en la Esperanto-movado akiris reputacion kiel AGADO E3 (Esperantistoj esperigas esperantojn). Kun ĝojo kaj danko la iniciatinto povas diskonigi, ke esperantistoj el la tuta mondo, de kiu ajn religia kredo aŭ politika konvinko, sukcesis realigi dum tiu 12,5 jarojn longa periodo tri helpoprojektojn en Kenjo kaj Malavio, kaj ke ili nun subtenas la malsanulejon de Ndoungué en Nkongsamba sub la moto "Lumo por Kamerunio".

Ĝojo kaj danko plenigas ĉiujn, kiuj dum la pasintaj jaroj iel kontribuis. Temas pri multnacia aro da geamikoj kun vidantaj okuloj kaj helpantaj manoj, kiu — sendante monon, librojn, diskojn, pupojn, folklorajojn, poŝtmarkojn kaj ĉion ceteran — ĉiujare kolektis ĉirkaŭ 10 000 ned. guldenojn. Centoj da esperantistoj kaj nesesperantistoj helpis, malfermante siajn okulojn kaj monujojn.

Kune kun la paralela agado HELPU AL LA LEPRULOJ, kiun jam dum jaroj senlace puŝas germana esperantisto d-ro Jozefo Kondor (Adreso: Johannes Gymnasium, D-542 Lahnstein, FR Germanio) — kaj kiom ofte blindeco kaj lepro kundependas en la Tria Mondo! — E3 estas konkreta pruvo, ke "amikeco inter la popoloj" ne estas nur facila surlipa slogano, sed videbla eksterigo de la esperantista solidareco.

La batalo kontraŭ blindeco ŝajnas afero finance venkebla, ĉefe per mondskala preventado. Antaŭ kelke da monatoj oni lanĉis dekjaran helpoprogramon mondvastan favore al ĉirkaŭ 40 000 000 da blinduloj. Specialistoj ĝenerale opinias, ke **tri el kvar** ne bezonas esti nevidantaj. La direktoro de la preventprogramo de Monda Organizo pri Sano, d-ro M.L. Tarizzo, diras ke la tempo estas matura por iniciati ambician planon. Homoj ĉiam pli kaj pli konscias, ke blindecon oni povas en multegaj kazoj kuraci aŭ preventi, ĉefe ĉe la kvar plej oftaj okulmalsanoj: **trakomo** (400 000 000 da viktimoj), **katarakto** (nur en Hinda Unio 6 000 000 da pacientoj), **onkocerkozo** aŭ **riverblindeco** (40 milionoj da suferuloj) kaj **kseroftalmio** (sekvo de nebona nutrado. Tiu lasta malsano estas vera skurĝo por milionoj da infanoj en landoj ekonomie malriĉaj).

Dum kunveno de la **Komitato por Preventi Blindecon**, okazinta en februaro ĉi-jare, en Aschaffenburg (FR Germanio), John Wilson diris, ke la elirpunkto de la Internacia Agentejo, kiun li prezidas, estas: "La teknologio por kuraci/preventi blindecon plene sufiĉas.



Milionoj da afrikaj blinduloj atendas helpon: Agado E3 praktike pravas la esperantistan solidarecon. (Fotoj de "Mensen in Nood", 's-Hertogenbosch)



La ĉi-supraj koloraj glumarkoj estas aĉeteblaj ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kun 32 glumarkoj kostas 3,00 guldenojn, kio inkluzivas la sendokostojn kaj la imposton (por Nederlando), aŭ 4 intern. respondkuponojn.

Preventado estas ekonomia neceso, teknika ebleco kaj humana devo. Tra la tuta mondo blindeco pli rapide disvastiĝas ol la loĝantaro, kaj ankaŭ en la evoluantaj landoj, precipe je pli alta aĝo, fariĝas problemo pli-graviĝanta." Wilson klare akcentis, ke sen mondvasta strategio nur diseriĝos la ekzistantaj vojoj kaj disponeblaj rimedoj. Kiel ekzemplon de kreskanta kunlaborado li menciis la grandan centron de dokumentado, efektivigitan kune kun Monda Organizo pri Sano en Ĝenevo.

Estas evidente, ke ĉi tie vastegas laborkampo ankaŭ por Zamenhof-anoj, kiuj per sia helpo honoras la bonkoran polan okuliston de la malriĉuloj. AGADO E3 esperas helpi al la hospitalo en Kamerunio, kiu urĝe bezonas **deklitan klinikon** kaj **la plej esencajn instrumentojn oftalmologiajn**.

Unuiĝintaj Nacioj proklamis 1979 INTERNACIA JARO DE LA INFANO. Ni helpu, profunde meditante pri la statistike seka konstato, ke en la mondo ĉirkaŭ 250 mil infanoj ĉiujare blindiĝas pro tro unuflanka nutrado, se tuja kaj abunda okulkuraca helpo forrestos...

Esperantistoj, esperigu esperantojn! Propagandu la Agadon E3 en via loka, regiona kaj landa gazetaro. Mendu la informilon *Vidu* kaj vidigu ĝin. Aĉetu kaj disvendu la jubilean glumarkon aŭ sendu monan kontribuon. En la nomo de nenombreblaj hodiaŭaj vidi-povuloj kaj morgaŭaj vidantoj antaŭdankon pro ĉia helpo! **Kampanja Banko:** Rabo-Bank, Heemskerk, Nederl. Kontonumero 10.73.00.990 (= Lumo por Kamerunio). Poŝtĉekkonto de la banko 15 10 93.

Kampanja adreso:
Jacques Tuinder

Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk
Nederlando

Recenzoj

Prestigaj verko kaj eldonejo


Recenzas Gaston Waringhien (Francio):

Praktika bildvortaro de Esperanto. Teksto kompilita de Language Services. Oxford: Oxford University Press, 1979. 96p. Kolorilus. de C. Clarke kaj R. Burrows. 23cm. ISBN 0 19 431236 4.

Jen libro, kiu donis al mia koro de simpla esperantisto duoblan motivon de ĝojo: la unuan fojon oni povas vidi sur titolpaĝo la — ĉe la oficialuloj tiel tabuitan — nomon "Esperanto"

kaj la prestiĝan markon "Oxford University Press"; ke tia firmo, mondfama pro siaj filologiaj eldonaĵoj, konsentis adopti Esperantan verkon, tio estas unu el la favoraj aŭguroj, kiuj pli-fortigas nian fidon en la sorto de nia movado. Oni memoras, ke simila procedo de adoptiĝo ebligis la aperon de la altvalora *Poŝatlaso de la mondo*, kaj certe tio estas

Praktika Bildvortaro de Esperanto



bona rimedo penetrigi nian lingvon en la eldonejajn mediojn.

La alia motivo estas la noveco de ĉi tiu verko: kiel montras la titolo, ĝi estas bildohava kaj praktika. Jam de longe kelkaj leksikografoj sentis, kiom da bezonoj restas nekontentigitaj sur la kampo de la ĉiutaga vivo: Stefano La Colla rilate al la itala lingvo, Kawasaki kaj Nakamura rilate al la japana, Wells al la angla kaj mi mem al la franca provis plenigi kelkajn el tiaj manklokoj kaj tiele faciligi la familiarajn konversaciojn; sed la alfabeto vicigo de niaj vortaroj ne helpas al la rapida lokalizo de la dezirata esprimilo. Aliflanke la laŭtemaj vortaroj — kiel la tre bona *Vocabulaire* de M. Duc Goninaz — liveras nur nacilingvaj tradukojn. Dank' al la racia utiligo de la ilustrado, la simpla esperantisto povos tuj elekti la klason de la objektoj, inter kiuj li havas ŝancon trovi la respondan bildon, kies numero fine liveros al li la bezonatan vorton.

Kompreneble, la bildvortaro estis origine aranĝita por la parolantoj de la angla, sed la materiala civilizo estas nuntempe tiel unuformiĝinta, ke tre malmultaj estas la britaj apartaĵoj. La maljunaj uzantoj rimarkos ekz-e, ke la litoj ne havas somieron, sed jam la junaj scias kontentigi sin per nura matraco.

Eĉ la plej spertaj Esperanto-lingvanoj povas lerni de ĉi tiu libro pli ol unu interesan terminon de la ordinara

vivo; mi persone plezuriĝis je la renkontiĝo, ekz-e de *ombrumo* (palpebroŝminko), *transirejo* (zebre mont-rita), *fatrasujo* (surstrata ujo por deĵeti paperaĵojn ktp), *kastablo* (ĉe ĉiovendejo), *letertrogo* (ĉe sekretaria skribotablo) ktp. Kiel oni vidas, la elekto de tiuj terminoj eluzas la eblecojn de la kunmetado en nia lingvo, kaj kiel eble plej ŝparas neologismojn. La aŭtoro, kiu tro modeste kaŝas sin sub la firma marko "Language Services", konsciencie konsultis multajn praktikantojn de la lingvo kaj ankaŭ la bazajn vortarojn; i.a. li plurloke apogis sin sur la tre atendata "Bildvortaro Duden", kiun s-ro Eichholz jam de multaj jaroj preparas en konstanta interkonsiliĝo kun specialistoj kaj akademianoj. Tia prudenta procedo donas al la *Praktika bildvortaro* ne-kontesteban valoron, kaj ebligas al mi deziri por tiu modela verko plej grandan diskonatecon.

Mendu ĉe UEA: 13,50 (por Nederlando 14,04) gld., plus sendokostoj 10%.

Mauro Nervi – majstro survoje

Recenzas Probal Daŝgupto (Melburno):

La turoj de l'ĉefurbo, de Mauro Nervi (1959-). Kun antaŭparolo de Aldo de' Giorgi. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1978. 119p. 21cm. ISBN 0 9505323 2 0.

"Kiel en la praktika mondo tiel ankaŭ ĉe la literaturo la grandiozaj monumentkonstruoj de antikvaj reĝimoj aspektas belaj de malproksime sed ne estas vive uzeblaj. Ni sentas kapturigojn sur la altturoj de la filozofio kaj ni fiaskas tranokti en belpoeziaj barokaĵoj. Konstruoj antikvaj havis la celon apartigi kelkajn homojn for de la tuta socio. Sed la etoso de la nova erao kunigas la homojn kun homoj en frataron, kiu ekskluzivos neniun. La atingoj de la nova beletra ne atakos la ĉielon, sed ĉiam pli okupos la teron plure."

Tiel pluralismis Promotho Ĉoŭdhuri, influhava ideologo pri la moderna bengala literaturo. Lia komento ne nur bone resumas la precipan konkretan penson de la nun recenzata aŭtoro, sed ankaŭ specifas la signifon de lia artista plureco, kiun forte manifestas *La turoj de l'ĉefurbo*.

Per *La turoj* debutas italo, pri kiu unua impulso emigas komenti, ke li fariĝos nia korifeo en la verkado beletra kaj ideado pri arto kaj vivo, se li iel daŭrigos sian nunan iron. Sed konstatigas tuj, ke lia naturo rezistas korifeecojn por si kaj por aliaj. Tia koloro kiel Mauro Nervi realiĝas nur per ĉeekzisto de kontraŭkoloroj klare malsamaj ol li. Kaj generacio da tiaj malsamuloj efektive jam esprimis sin. Oni pensu al la poezio de Long kaj de Valano aŭ al la stilaroj de penso kaj interpreto ĉe junaj prozuloj en Esperantujo, beletraj aŭ ne. Ni vivas en tempo, kiam juste trakti unuopulan poemaron jam ne eblas plu. Bonŝance, *La turoj* en-

havas ne nur poemojn kaj dramojn sed ankaŭ art-prozaĵojn kaj memkommentaron. Kvankam la nuna vidkadro ne permesas sidigi (kiel indus) la verkojn de Nervi apud aliulajn, tamen ni ja povas rigardi al la plureco en Nervi mem, evitante do recenzi unuismom, kiu perfidus lian esencon.

La ĉefa risko de Nervi estas tendenco al novbarokismo. Lia artprozo impresas iom tro "plaĉa", krom (kaj eĉ tiun kromon mi nur kun hezito cedas) por la speciale senfuriozaj celoj de bildado, al kiuj liaj skiznoveloj limigas sin. Aliteracio, kiel en **fluGtanĜas la marĈon stranGaj birdoj kun larĜaj fluGiloj** (32), kaj nuancozorga tekso, kiel en **via cerbo jam boras la nokton**, [. . .] **tuŝas la kosmon per malkonkretaj fingroj** (26), subfosas la diafane rakontan sukceson de la prozisto Nervi. Aliflanke, li elmanigas ankaŭ kontribuajn, pli ol formajn atutojn, kiel **denove konstrui sian vivon, kompreneble inter tiuj limoj, kiujn oni konsentas al maljunulo** (28) aŭ **la kavaj ĉambroj, kie li trarutinis sian tutan vivon** (28). En prozaĵo tiaj atutoj, malkiel troa tekso kaj tio kion Sadler nomis "aliteracio literlaciga", efike vestas la skeleton de la fluo sen danĝero de tio, ke leganto paŭzos por admiri la sonon de elstara vortaĵo ĝis li forgesos ĝian urĝecon (aŭ, en la idiomo de Nervi, ĝian silenton). Kaj urĝaj la prozaĵoj de Nervi ja estas, aparte plej "La amiko", kiu skuas la animon ĉe konstato de la ebleco relegi ĝin kiel severan, tamen ne senkompatan, komenton pri la generacioj de Kalocsay kaj eble ankaŭ Auld.

En la poemo "Al Kalocsay" li ja klare diras: "tamen mi relegas la poemojn / de via junco, Kalocsay, kaj pensas." Ne la pensigecon de la antaŭpoetoj li dubas, sed ĉu iun ili jes instruis pri tio kio gravas. Li ankaŭ, en siaj poemoj, esploras per profunda dubo la rajton entute instrui. Nur la "asfaltita vojo / de l'efektivo, kiu daŭre pledas / por pli homeca vivo" (37) instruu nin en lia "mondo nokta, pleje mallogika" (38), kie (por la unua fojo jenon iu vere diras en la Esperanta poezio) "ŝtalo / kaj plasto premsufokas nian junon; / sed iu, eble trans simbolvualo / intuicios multsignifan sunon, / kaj ekkomprene pri la nunsocio / penos deĉifri la enigman runon" (38). Dum oni serĉas aŭ atendas tiel ampleksan intuicion, necesas ja sin esprimi kun la duma atendo, ke "respondo / obskure gongas per profundaj eĥoj" (61). Nur per tiu intelekta plejhumilo ni efektive "konstat[os], / ke ĉion ni konstruis / senpripense" (62).

Tia repudio de antaŭulaj "allogaj certoj" rezonaj (37), celante (jen strategio kiun multaj adoptis sed laŭ diversaj interpretoj) anstataŭe honori "ĉi fremdan jarcenton" (57) per tiu transpaso en la estontecon kiun ĝi meritas, naskas poetikon de disciplina malobeo al la gvidlibroj. Kiel la plej karakterizan aferon en la nova poetiko mi kuraĝas emfazi la eksplicite partan raciecon de sencesprimo. Notu, ekzemple, la specifon (112), ke "la du versoj, kiujn F. deklamas fine de ĉiu strofo [ie en samlibra versdramo], ĝenerale havas [. . .] **nur ritman funkcion**" (mia emfazo). Same "nur" ritman funkcion havas kanzonstilaj ripetoj, plej frappe en la titolpoemo. La rapide klasikiĝanta principo, ke ofte la

ritmo mem portas la ĉefan sencon pli senpere ol la ritmitaj vortoj, ĝuas esperplenumo aktivan vivon en la poemoj kaj dramoj de ĉi tiu rekta heredanto de la ideoj de Breĥt kaj Kroĉe, kiuj preskaŭ naskis tiun principon.

Estas grave por la tono de la volumo, ke ĝi finiĝas per sinklarigo proponanta zorgan marksisman analizon pri la nuna kaj esperinda evoluoj de la Esperanta teatro, kaj ke la analizon (kaj la tutan sinkomentaron) sekvas finala poemo admonanta: "Laŭvole malaprobu; sed, ne haltu." Malgraŭ la digna neracio menciita supre, la libro emfaze prezentas vastan reton da ideoj proponoj, precipe analizojn kaj mirajn konjektojn pri interhomaj rilatoj. Kaj, krom ŝoketiĝi pri la uzo de **terurigas** (78) anstataŭ **teruras** en verko de lingvomajstro, krom informi legontojn, ke precipe la dramojn kaj parte la poemojn verkis avida sorbinto de la helena literaturo, ankaŭ mi ne al simple "literaturaj" flankoj direktos mian kritikan rimarkon, sed al la ideo elementaro de Mauro Nervi. La rimarko celas ne "malaprobi" sed atentigi pri validaj nenerviaj koloroj, kies alieco donas al Nervi lian propran identon. Jen la rimarko.

Kvankam marksano, Nervi (kiel multaj marksanoj) pense kaj praktike flankenlasas la fojrefojan aserton de Marks, ke, se estas iu unu fadeno komprenebliganta la tutan mondhistorion, ĝi do estas la kontraŭdiro inter

kon, necesas do, ke ili maksimume konsciu pri ĝi. Al tia konsciigo grande helpas, ke debutinta italo, kies majstra sinesprimo pliklarigas niajn klarojn kaj plintensigas niajn obskurojn, en siaj verkoj ankaŭ la transcendendan mankon manifestas je modela intenso.

Estas paradokse, ke tiel forte por-Esperanto-gravan akriĝon de konscio Mauro Nervi atingas ĝuste per intensa prilaboro en sia itala/eŭropa verka tradicio. Tia la pluralismo. Jen la temo, per kiu la ĵusaj konsideroj ekekis.

Mendu ĉe UEA: 10,80 (por Nederlando 11,23) gld., plus sendokostoj 10%.

Bone ĉizitaj karakteroj

Recenzas Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakio):

La nova butikisto de Nukugaia kaj aliaj noveloj, de Bertram Potts (1895-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 250p. 21cm. Bel-literatura eldonserio 38. ISBN 90 6336 002 9.

Jen estas originala novelaro, kun esence du specoj de temoj: interbatalaj paŭzoj de la unua mondmilito, kiun la aŭtoro partoprenis en Belgio kaj pri kiu li ŝajnas esti konservinta (feliĉe!) nur humurajn rememorojn, kaj la pacifika, al mi malmulte konata mondo. Ili ĉiuj estas t.n. "bagatelaj" temoj, sed el la plumo de la aŭtoro ili elkreskas en arte plektitan reton de personoj, de variaj karakteroj kaj de atentokaptaj okazaĵoj, en kiuj ofte ne mankas bonhumoraj eroj kaj momentoj de surprizo aŭ neatendita solvo.

La homtipoj — blankuloj kaj maorioj egale — aperantaj en la noveloj, estas el karno kaj sango, bele diferencigitaj, havantaj propran karakteron — veraj movantoj de la agado. Sufiĉas nur menci iel ekzemplojn la pensionanojn en la novelo "Dentpikilo", la ĉefserĝenton el "La kuriera artifiko" aŭ Rosalie el "Taso da teo".


Ĉiuj personoj parolas sian karakterizan lingvaĵon. Kelkfoje iliaj esprimoj evidente estas anglaj pensoj vestitaj en Esperantajn vortojn, kaj iam oni tion sentas kiel mankon, dum aliffoje tio sentiĝas kiel plia, aparta karakteriza trajto de la parolanto. Iam ni trovas ankaŭ la uzon de vortoj en ties tipa angla signifo (ekz. "lasi ion kun iu", anstataŭ "ĉe" aŭ "al" iu; "vi... daŭre vojaĝos", anstataŭ "daŭrigos vian vojaĝon"). Foje tio iom ĝenas, sed ne malofte la efiko estas tia, ke esprimo unuavide neĝuste uzita, ricevas mem kaj donas al tuj apudaj vortoj interesan, specialan kromguston. Tamen, ni estu justaj, la aŭtoro donas al ni aron da tre interesaj, trafaj esprimoj kaj vortkombinaĵoj solvoj, pliriĉigante tiel la Esperantan frazeologion. Tekst-eraroj malabundas.

Bertram Potts — cetere profesia verkisto vivanta en Nov-Zelando — majstras ne nur la temon, sed ankaŭ la stilon kaj evidente ĝuas eluzadi la eblecojn. Por kon-



MAURO NERVI

LA TUROJ DE L' ĈEFURBO



Bertram Potts

pli kaj malpli urbaj homoj. Necesas atenti, kiel tiu kontraŭdiro manifestas sin ene de kritiko kontraŭ la moderna mondo. (Tiu ĉi konsiderado evidente rilatas ne nur al verkoj de Nervi sed ĝenerale al la tutaj vivo kaj movado de esperantistoj, ĉar Esperanto staras kontraŭ la nuna mondo, kie la fiero de unuj lingvoj sisteme ekstermas la dignon de aliaj.) Unu el la atentindaj manifestiĝoj estas la praktika kaj tona kontraŭdiro inter okcidentaj (artistaj kaj sociismaj) kritiko de la moderna okcidento-dominata mondo, unuflanke, kaj la diversaj ne-okcidentaj oponadoj al la okcidenta hegemonio, aliflanke. Nervi firme situas en okcidenta kritika tradicio, kiu ne sufiĉe vidas sin kiel nuran memkritikon, kaj li heredas tiun nesufiĉon. Ĉar nur okcidentanoj per siaj propraj agoj kaj pensoj povas transcendi tiun man-

vinkiĝi sufiĉas legi la dialogojn de la pensionanoj en "Dentpikilo" aŭ la preskaŭ-monologon de la preskaŭ-aktoro Featherston Blenkinsop en "Aktoro en serĉo de famo".

La aŭtoro donas al ni interesan, variteman, ne ĉiutagan novelaron, en kiu eble ne estas sensaciaĵoj, sed kiu elradias homecan varmon, profundan komprenemon al simplaj homoj, trankvilan bonhumoron kaj ekzotikan, ofte poeziplenan pacifikan atmosferon.

Mendu ĉe UEA: 15,00 gld (por Nederlando 15,60) gld., plus sendokostoj 10%.

Oni devas atenti la normojn

Recenzas Josip Velebit (Jugoslavio):

Esperanto-makedona vortaro kaj makedona-Esperanta vortaro, kun konciza gramatiko, de M. Galeski kaj G. Pop-Atanasov. Prilep: Esperanto-Societo "La Progreso", 1977. 283p. Bind. 18cm.

Publikigo de Esperantaj lerniloj kutime signalas pli viglan societan vivon de certa Esperanta rondo. Tiu aserto validas ankaŭ por la makedona Esperanto-Societo en Prilep, kies agemo rimarkeble viglas.

Al la duparta vortaro la aŭtoroj aldonis sufiĉe abundan liston de geografiaj nomoj, kemiaj simboloj, ĝenerale uzataj mallongigoj ktp. Sekvas mallonge skizita gramatiko, kun 16-paĝa kompletigo per la afiksoj, numeraloj, prepozicioj, konjunkcioj, interjekcioj kaj partikloj.

Rilate la vortaron mem oni devas tuj diri, ke en ĝi troviĝas sufiĉe da preterlasoj kaj deĵojigoj de la starigitaj normoj. Hodiaŭ, post pli ol 90-jara ekzisto de Esperanto, ni havas fidindajn kaj serioze verkitajn vortarojn, kiujn oni nepre devas konsideri ĉe la verkado de ĉiu nova vortaro por la praktika uzo. Ni menciuj nur: *PIV*, *Grand Dictionnaire Espéranto-Français* de G. Waringhien, la duvolumajn vortarojn de A. Pechan, por la hungaroj, kaj tiun de E.A. Bokarev, por la rusoj.

La ĉefan mankon prezentas la misa klasifikado de la substantivoj, verboj kaj aliaj vortspecoj, ĉar el ĝi fontas ĉiuj aliaj neperfektaĵoj, kiujn enhavas tiu ĉi vortaro. Oni trovas multajn substantivojn, kiel ekzemple: *abstino*, *deliro*, *kontrakto*, *kontuzo*, *kvalifiko*, kiuj staras tie solaj, malgraŭ ke ili estas verbdevenaj kaj devas esti jene notitaj: **abstin-i**, **-o**, **delir-i**, **-o** ktp. La samo validas por *skalpi* kaj *sonĝi*, **-o**, kiujn oni skribu: **skalp-o**, **-i**, **sonĝ-o**, **-i**, ĉar temas pri substantivdevenaj vortoj.

Similan mankon prezentas la arbitra envicigo de la vortoj. El la menciitaj, la substantivo *deliro*, ekzemple, tute ne estas klarigita en la makedona-Esperanta parto, *domaĝo* staras sola, sen la parenca verbo *domaĝi*, trovebla en tiu vortarparto apud la substantiva formo, kies klarigo iom diferencas de tiu en la Esperanta-makedona vortaro. La ĝustan signifon de la derivaĵoj *kontuz-i*, **-o**, *lez-o*, **-i**, *vund-i*, **-o**, *difekt-i*, **-o** oni ne po-

vas trovi en la vortaro, ĉar ĉe la unua derivaĵo mankas la verba formo, kaj ĉe la dua kaj lasta oni ellasis iliajn substantivojn; ĉe *difekti*, *lezi* (p.66), *vundi* (p.118) oni mise klarigas, kvazaŭ ili ne estus certagrade parenca signifaj. Por la plursignifa verbo *agiti* ne sufiĉas la klarigo "varbi por iu celo", kaj ĉe *agordi* oni ellasu la noton, ke tiu verbo rilatas nur la muzikon. Fine, post *agiti*, kaj same post *agordi*, povus esti aldonita **ig**-formo. Ĝuste la manko de tiuj **ig**-verboj, same kiel la manko de la refleksivo ĉe la transitivaj verboj, tre forte sentiĝas en la dua parto de la vortaro. Ofte forestas pli detala kaj tiel pli ĝusta klarigo de multaj plursignifaj verboj, ekzemple: la verbo *podveduva* (p.241), kiel transitiva, ne signifas "subordigi", sed "redukti; devojigi, trompi"; *posvetuva* (p. 244), krom "dediĉi" signifas ankaŭ "oferi; lumigi; atenti ion; konsekri".

Mal-vortoj de ĉiuj vortspecoj, precipe de la adjektivoj, videble mankas en la vortaro. Tiel ekzemple, *malobe-i*, **-o** mankas en ambaŭ partoj de la vortaro, dum la adjektivo *malbona* troviĝas nur en la makedona-Esperanta parto; *akra*, *bela*, *bona*, *laŭta* ktp. tute ne havas siajn antonimojn en la Esperanta-makedona vortarparto.

La vortaro, malgraŭ la bonaj kaj laŭdindaj intencoj de la aŭtoroj, enhavas sufiĉe da mankoj, nepre korektendaj en la dua eldono. Oni kompletigu la materialon, reordigante la tutan libron laŭ la principoj, kiujn aplikas rekonitaj vortaristoj.

Mendu ĉe UEA: 14,10 (por Nederlando 14,66) gld., plus sendokostoj 10%.

Du represoj

Recenzas W. Krikke (Nederlando):

El la "Verda Biblio" (1935), de Izrael Lejzerowicz (1901-1944). Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1978 (2a eld.). 83p. Ilus. 18cm. ISBN 963 571 036 4. 1 "En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapük-on. 2 Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa kaj mal-lumo estis en ĝi. 3 Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo: kaj fariĝis Esperanto. 4 Kaj la Spirito vidis Esperanton, ke ĝi estas bona: kaj la Spirito apartigis Esperanton de Volapük. 5 Kaj la Spirito nomis Esperanton Eterna Tago kaj Volapükon nomis Nokto. Kaj estis vespero kaj estis mateno — unu Tago".

Jen la komenco de tre bonhumora libro, aperinta unuafoje en 1935. Se vi iom konas la orientan stilon de la biblio kaj iom scias pri la historio de Esperanto, vi legos kaj relegos ĉi tiun satiron kun plezuro kaj vi divenos la nomojn Bofrunt, Andreo Apud, Osbriko, Junio Pagi, Kafo Alt, Kalsurmano Galoŝej, Ragmond Ŝerc kaj multajn aliajn. Kaj krome vi rimarkos, ke multe el la spirita kritiko ankaŭ estas necesa.

La knaboj de Paŭlo-strato (1907), de Ferenc Molnár (1878-1952). El la hungara trad. Ladislao Somlai (1937). Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1978 (2a eld., fotoreprese). 180p. 19cm. ISBN 963 571 039 9.

I. Lejzerowicz

EL LA „VERDA BIBLIO”



FERENC
MOLNÁR

LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO

Ĉi tiu rakonto estas destinita por knaboj kaj por ili ĝi estas taŭga. Temas pri infana milito inter du grupoj de knaboj, kiuj estas fantaziemaj kaj aventuremaj. La fino estas iom tragika, kiel ofte okazas en realeco. La okazintaĵoj en la historio kelkfoje estas nekredeblaj, sed tio okazas en multaj romanoj. La lingvaĵo estas relative bona, sed ŝajne neniu korektis la unuan eldonon kaj, ĉar la dua estas fotorepreso, ĝi ne povis esti ŝanĝita. Tion mi forte bedaŭras, ĉar junaj komencantoj bezonas senriproĉan legaĵon. La tradukinto tro ŝatis la adverbajn formojn kaj la direktan "en". Kio estas "lakteto" kaj "orelumi"? Estonte oni traduku nur la plej interesajn kaj modernajn librojn por niaj komencantoj kaj, laste sed tre grave, minimume du personoj severe kontrolu la tekston.

Mendu ĉe UEA: *El la "Verda Biblio"*: 9,60 (por Nederlando 9,98); *La knaboj de Paŭlo-strato*: 16,20 (por Nederlando 16,85) gld., plus sendokostoj 10%.

Traduko antaŭ originalo

Recenzas D.B. Gregor (Britio):

Erevono, utopia satira romano (1872), Samuel Butler (1835-1902). El la angla trad. Alec Venture. Londono: La tradukinto, 1978. 6+177p. 22cm.

La titolo montras, pri kio temas; aŭ, ĉar la Esperanta literaturo estas nun tiel multĝenra, sufiĉas loki la verkon apud *Vojaĝo al Kazohinio* de Szathmári. Kiam mi legis ĝin en la angla antaŭ jaroj, ĝi ne multe plaĉis al mi; sed nun, leginte ĝin en Esperanto, mi entuziasmiĝis. Sendube dankindas pro tio la boneco de la traduko: treege klara kaj flua; nur la evito de aktivaj kunmetitaj tempoj (mi rimarkis nur du) malebligas al mi nomi ĝin zamenhofa. La samo validas por la leksiko. Mia mano jukas por listigi la multajn lertajn redonojn de anglaj vortoj, sed mi kontentiĝas aldonante ilin al mia vortaro.

Venture estas konata kiel la linkokula kontrolanto de tekstoj en gazetoj; do li pardonos min, se mi petas

"laŭokazan noton" pri kelkaj punktoj: **atentigi al mi pri** (II/12); **ni estas malkomfortaj... varmaj** (12); **malversis** (50); **transdoni pli ol pala bildo** (62/18 kc.); **tro malsana ion fari** (68); **eliri** jen netransitiva (ĝusta) jen transitiva. Magra rikolto! Sed atentu, ke **ŝajnigi, kva-zaŭ** zamenhofe ne prenas la kondicionalon (28 kaj 76); **antaŭe mi ludis** (evito de pluskvamperfekto) ĉi tie estus pli bone **mi estis ludanta** (41/15); ĉe 143/8 **pri tiu temo** devus sekvi **sekvis**; ĉe 113/-4 **por ke...kutimiĝu** devus esti **tiel ke -is**; ĉe 159/-10 **ke** devus dependi de **kre-di**.

La belajn litertipojn kaj paperon makulas trideko da preseraroj. Domaĝe! Nur teknika perfekteco estus inda ĉi tiun majstran tradukon.

Mendu ĉe UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

Por progresintoj

Recenzas Roberto Passos Nogueira (Brazilo):

Apontamentos de Esperanto, de A.S. Almeida. Lisbono: Portugala Esperanto-Asocio, 1978. 287p. 21cm. Mimeo.

Malgraŭ la pli ĝenerala utiligo de modernaj metodoj, la gramatikeca vojo al lingvaj lernado kaj perfektigo restas ankoraŭ plene taŭga, precipe por kleraj homoj, jam lernintaj aliajn lingvojn, ĉar al ili ege ripetataj ekzercoj kaj parolaj lecionoj povas ŝajni ĝenaj kaj temporabaj. Tian tradicion instrumanieron sekvas ĉi tiu libro. Ĝi enkondukas en detalojn de la fonetiko, morfologio kaj sintakso de Esperanto laŭ procedo kiu prezentas unue difinon pri la kategorio traktata (artikolo, akuzativo, komplementoj, k.s.), notas la korektajn uzojn, donas ekzemplojn, ktp.

Temas pri lernolibro, kiu apenaŭ povas esti uzata de komencantoj, tial ke ĝi ne obeas ordon de kreskanta komplekseco. Sed rekomendindas al progresintaj lernantoj kaj specialaj klasoj portugallingvaj, ĉe kiuj oni ne konstatas specialan abomenon al la gramatikaj subtilaĵoj.

Al kelkaj lingvistikemuloj povas malplaĉi la rango de tre malnoviĝintaj nocioj, ekzemple, kiam la konsonantoj estas difinitaj kiel "literoj kiuj, ĉe ia vorto, ne liveras sonon, escepte se ligitaj al vokalo aŭ diftongo". Evidente, konsonantoj tute ne estas "literoj", kaj tiu konfuzo nur povas esti klarigita de tio ke la klasika gramatiko konsideris la skriban lingvon la vera objekto de analizado kaj modelo de ĝusteco. Cetere, la difino ne responsas al la kriterioj de moderna fonetiko. Similaj "tradiciaĵoj" svarmas tra la tuta libro, sed povas esti preteratentitaj, ĉar oni intencas instrui Esperanton kaj ne lingvistikon. La libro alportas profiton al la didaktika literaturo pri Esperanto en la portugala lingvo, prezentante aldone ĝojigan signon de la vivanteco de Portugala Esperanto-Asocio.

Mendu ĉe UEA: 14,10 (por Nederlando 14,66) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Antologio de argentinaj noveloj. Red. Bastono de Kordobo (ps.). El la hispana tr. diversaj. Diamanto: Argentina Esperanto-Muzikeldonejo, 1979. 200p. Ilus. de Horaco de Diamanto. 18cm. 18 noveloj de 10 verkistoj. Prezo: 13,50 gld.

Apontamentos de Esperanto, A.S. Almeida. Lisbono: Portugala Esperanto-Asocio, 1978. 287p. 21cm. Tradicimetoda lernolibro, rekomendinda por progresantoj. Prezo: 14,10 gld.

Bahá'u'lláh kaj la nova epoko (1925), J.E. Esslemont (1874-1925). El la angla tr. Lidia Zamenhof (1930). Bahaa Esperanto-Ligo, 1978 (2a eld., lingve reviziita kaj ĝisdatigita de Roan Orloff Stone). 321p. 19cm. Klasika verko pri la historio kaj doktrinoj de la bahaismo. Prezo: 11,10 (broŝ.); 22,80 (bind.) gld.

Elektitaj fabloj, Ivan Andrejevič Krilov (1768-1844). El la rusa trad. Sergej Grigorjevič Rublov. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 336p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 009 6. Belliteratura eldonserio 35. Serio Oriento-Okcidento 15. Prezo: 21,00 gld.

Elektitaj verkoj de Verda Majo (ps. de Teru Hasegawa, 1912-1947). Kompilis Masao Miyamoto. Tokio: Aki-syobō, 1979. 7+369p. Japanlingvaj verkoj de fama japana esperantisto, kiu edziniĝis al ĉino kaj partoprenis la ĉinan komunisman movadon. Prezo: 31,50 gld.

Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus?, Richard Schulz. Gerlingen: Bleicher Verlag, 1979. 256p. 19cm. ISBN 3-88350-000-3. Pri la lingva problemo en Eŭropo, kaj la ebleco ĝin solvi per Esperanto. Germanlingva. Prezo: 16,20 gld.

Granda galerio Zamenhofa 2. Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1978. 419p. Ilus. 30cm. Bindita. ISBN 951-9005-42-0. Fotoj de L.L. Zamenhof, liaj familianoj, monumentoj, Zamenhof-stratoj, titolpaĝoj, dokumentoj, lokoj kie Zamenhof iam estis ks. Prezo: 112,20 gld.

Horizonto de Soveta Litovio, n-ro 4. Kompilis P. Jegorovas, P. Rukšėnas kaj A. Vaitilavičius. Vilnius: Mintis, 1979. 45p. Ilus. 29cm. Originalaj kaj tradukitaj poemoj, rakontoj, artikoloj, i.a. "Zamenhof kaj Litovio" de J. Petrulis. Prezo: 3,00 gld.

Kalva kantistino, La (1948), Eugène Ionesco (1912-). El la franca tr. G. Lagrange. Paris: TESP, 1978. 56p. 25cm. Absurdisma komedio, kies dialogo baziĝas sur lingvoekzercaj frazoj. Prezo: 7,80 gld.

Kara diablino, Douglas P. Boatman (1892-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 112p. 21cm. Bel-literatura Eldon-serio 40. ISBN 90 6336 014 2. Misterromano kun parapsikologiaj elementoj, ekz. psika intersanĝo. Prezo: 12,00 gld.

Katastrofplano pri la atomcentralo de Fessenheim kaj Verdikto pri Wyhl. El la franca tr. Jacqueline Lépeix. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1980 (fakte 1979). 39p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 133B. Prezo: 3,00 gld.

Kiel personeco sin strukturas, Claude Piron (1931-). Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1978. 5+108p. 30cm. KT 27. Pri la komplekseco de la homa agado kaj de ties motivoj. Prezo: 21,00 gld.

Kontraŭflue, Valo (ps. de R. Laval, 1900-). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1980 (fakte 1979). 102p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 135B. Aŭtobiografia verko, ĉefe pri la jaroj 1914-1918. Rigardebla kiel sekvo de *El la kara infaneco* de la sama aŭtoro. Prezo: 4,80 gld.

Language et communication internationale: le droit à la communication, Humphrey Tonkin. Rotterdam: UEA, 1979. 12p. 21cm. ED-4F. Prezo: 3,00 gld.

Manlibro pri Esperanto en bibliotekoj, Marinko Ĝivoje (1919-). Zagreb: La aŭtoro, 1978. 33p. Mimeo. 30cm. Studo pri Esperantaj librokolektoj publikaj, movadaj kaj privataj tra la mondo, kun detaloj pri aperintaj katalogoj kaj bibliografioj. Prezo: 3,60 gld.

Mi amas..., Masao Ueyama (1910-). Kioto: L'Omnibuso, 1977. 100p. Ilus. de Eizo Saito. 19cm. Aŭtobiografiaj noveloj, kiuj ofte tuŝas delikate la seksan dimension de la vivo. Prezo: 11,70 gld.

Mistero de nia surtera ekzisto, La (1944), Ernest Archdeacon. El la franca tr. André Caubel. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979. 27p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 131A. Kontraŭkristana. Prezo: 1,80 gld.

Podręcznik języka międzynarodowego, Andrzej Pettyn. Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1979. 241p. 20cm. Prezo: 9,00 gld.

Poemoj, Edward Thomas (1878-1917). El la angla tr. K. Long kaj V. Sadler. Bracknell: Long, 1979. 26p. 21cm. 37 poemoj, ĉefe lirikaj, kun forta amsento al Anglio. Prezo: 1,80 gld.

Praktiku kun ni Esperanton (1976), K.-P. Fritz, H. Lühmann-Fritz, H. Trunte kaj Yashovardhan. Bonn: Esperantista Grupo Universitata de Bonn, 1978 (3a eld.). 4+115+44p. Ilus. de P. Conzen. 21cm. Lernolibro en 12 dialogoj kun sistema konciza gramatiko. Escepte de la apendica vortareto, uzebla ankaŭ ĉe negermanlingvanoj. Prezo: 7,20 gld.


Program nauczania języka Esperanto, Andrzej Pettyn. Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1979. 25p. 21cm. Instruprogramo, kun baza radikaro oficiala. Prezo: 0,90 gld.

Bleicher
Aktuelles Taschenbuch

Richard Schulz

Europäische
Hochsprache
oder
Sprachimperialismus?

BAHÁ'U'LLÁH
KAJ LA NOVA
EPOKO



SOCIPOLITIKAJ

ASPEKTOJ

DE LA

ESPERANTO-MOVADO

CARLOS DOMINGUES

VOCABULÁRIO

PORTUGUÊS

ESPERANTO

PORTUGUÊS



Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Red. Detlev Blanke. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 228p. 19cm. ISBN 963 571 035 6. Studoj de A. Rátkai, S.N. Podkaminer (pri Lenin kaj Esperanto), D. Blanke, U. Lins (pri la Esperanto-movado sub la naziismo), E. Drezen kaj M.I. Isaev. Prezo: 15,30 gld.

Ŝtormnokto ĉe landlimo, Liu Vejfen. El la ĉina. Pekino: Fremd-lingva Eldonejo, 1978. 34p. Pentris Meng Hijuan. 19cm. 88-Es-148P. Juna mongolino malhelpas kontraŭrevolucion sabotadon. Prezo: 1,20 gld.

Taschenlehrbuch Esperanto, Till Dahlenburg kaj Peter Liebig. Leipzig: VEB Verlag Enzyklopädie, 1978. 266p. Ilus. 19cm. Bindita. 20-leciona lernolibro, kun gramatiko kaj E-germana vortareto. Prezo: 9,00 gld.

Telepatio kaj ĝia socia signifo, La (1968), Sokratis Sakelloropoulos (1908-). Ateno: La aŭtoro, 1978 (2a eld., pliampleksigita). 112p. Mimeo. 24cm. Parapsikologia studo. Prezo: 7,50 gld.

Vocabulário Português-Esperanto Esperanto-Português, Carlos Domingues (1896-1974). Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto, 1978. 233p. 19cm. Prezo: 18,00 gld.

Verslag van het colloquium "Verleden, heden en toekomst van de Esperanto-beweging in Vlaanderen". Red. E. Symoens. Kalmthout: Europa-Klub, 1978. 40p. 21cm. Artikoloj pri la flandra Esperanto-movado. Nederlandlingva. Prezo: 5,70 gld.

Vulkane, Emily Dickinson (1830-1866). El la angla tr. Kris Long kaj William Auld. Bracknell: Long, 1979. 40p. 16cm. Elektro el la verkoj de la plej grava poetino de Usono. Prezo: 1,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

PRAKTIKA UTILIGO DE ESPERANTO:

Necesas reagi

VERSĀJNE Nederlando estas la sola lando, kies publikaj telefonejoj havas Esperantan klarigon pri la uzo de telefonilo. Ĝi staras tie apud la tekstoj en la nederlanda, angla, germana kaj franca lingvoj. En 1972, unu el la 16 telefondistriktoj de la ŝtata entrepreno PTT (Poŝto, Telegrafo kaj Telefono) forigis la Esperantan tekston, lasante la aliajn 4 lingvojn, kun la preteksto, ke la spaco sur la klarigtabulo estas limigita. Sur la klarigtabuloj por novaj telefoniloj nun enkondukataj en la tuta Nederlando ne plu aperas la Esperanta teksto, "pro la relative malmultaj vizitantoj kun scio pri Esperanto kaj sen scio pri unu el la aliaj lingvoj uzataj sur la klarigtabulo" (laŭ letero de PTT: ĝia referenca numero 790502/906/AT 1).

Se vi, leganto, iam vizitis Nederlandon kaj utiligis publikan telefonilon, bonvolu skribi reagi al la jena adreso: Ĝenerala Direktoro, Centra Direktejo de PTT, Postbus 30000, 2500 GA Den Haag, Nederlando.

Se PTT ne ricevis ĝis nun iajn reagojn de eksterlandaj esperantistoj, ne estas strange, ke ĝi konkludis, ke malmultaj homoj utiligas la Esperantan tekston. Espereble multaj leteroj, precipe ekstereŭropaj, atingos la indikitad adreson. Esperanto-Centro Nederlanda (Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag) volonte ricevos kopiojn de reagaj leteroj por informiĝo.

VOLAPUKO 1879-1979:

Deko da adeptoj por la centjariĝo

LEGANTOJ de *Esperanto* trovis en la ĉi-jara januara numero (p. 3-6) informojn pri la centjara datreveno de la publika prezento de *Lingwe Uniwersala*, la unua formo de Esperanto. En 1979 oni festas la centjaran jubileon de alia planlingvo, kies historio ligiĝas al tiu de Esperanto. Temas pri volapuko, la sola internacia lingvo de la 19a jc., kiu, same kiel Esperanto, ne restis en la kabineto de sia kreinto, sed estis sukcese uzata internaciskale por komunikado trans lingvajn barilojn.

Johann Martin Schleyer (1831-1912), la aŭtoro de volapuko, estis gvidata de la sama idealismo, kiu inspiris Zamenhof. Ekde 1874 la adoleska Ludoviko, kiu estis gimnaziano en Varsovio, komencis plenigi kajerojn per gramatikaĵoj kaj vortlistoj, serĉante la plej trafan manieron konstrui vivipovan planlingvon. Samtempe la mezaĝa Schleyer, oficante kiel romkatolika pastro en urboj kaj vilaĝoj de Badenio, Germanio, okupiĝis pri

la sama problemo. Unue, en 1878, li publikigis sian proponon pri universala alfabeto por transskribi sonojn el ĉiuj lingvoj. Poste Schleyer ellaboris sian lingvo-projekton, al kiu li donis la nomon volapük, kunmetitan el la fonetike modifitaj anglaj vortoj **world** (mondo) kaj **speak** (paroli).

La unuaj informoj pri volapuko estis publikigitaj en majo 1879. De tiam etas eble diri, ke tiuj du internaciaj lingvoj, la iom tro rapide kunmetita volapuko kaj la embria Esperanto, bezonanta plurajn jarojn da provado, estis destinitaj rivali unu kontraŭ la alia. Tamen, la konkuro ne estis longdaŭra. Preskaŭ la tuta atentinda historio de la ŝlejera lingvo disvolviĝis en unu jardeko, de 1879 ĝis 1889. La rapida amasiĝo de adeptoj, diplomitaj instruistoj, publikigaĵoj kaj kursoj, same rapide malaperis, kiam skismo skuis la volapukan movadon pro konfliktoj inter reformemuloj kaj la necedema kleriko. Schleyer iris sian propran vojon, gardante sian lingvon kontraŭ la atencoj de malkontentaj volapukistoj. Dume, la Akademio de Volapuko okupiĝis pri ŝanĝoj en la lingvo, kiuj fariĝis tiel drastaj, ke finfine la Akademio mem transformiĝis por subteni aliajn lingvo-projektojn kiel **idiom neutral** kaj **latino sine flexione**.

Schleyer mortis en 1912, kaj volapuko, sen kapabla gvidanto, sen multnombra sekvantaro kaj sen iu ajn praktika uzebleco, restis en dorma stato ĝis la tridekaj jaroj. En 1931 okazis revekiĝo, kiam nederlanda kuracisto, d-ro Arie de Jong, publikigis vortaron kaj gramatikon de sia modifita variaĵo de volapuko. Oni komencis agadi en la revivigita volapuka movado: la Akademio de Volapuko estis denove establita, gazeto kaj lernolibroj en pluraj lingvoj estis eldonitaj. Estas ja certe, ke Schleyer, se li ankoraŭ vivus, neniam aprobus tiun volapukan renesancon, ĉar ĝia lingvo ne estis lia ortodoksa volapuko, sed hereze reformita idiomato. La fondinto de la nova epoko de volapuko mortis en 1957. Lia ĉefa sekvanto, Johannes Schmidt el FR Germanio, oficis kiel **Cifal** (prezidanto) de la **Kadām Volapūka** ĝis sia morto en 1977. Nuntempe F.J. Krüger el Amsterdamo, la redaktoro de la gazeto **Volapükagased**, estras la Akademion.

Lastatempe mi provis akiri donitaĵojn pri la nombro de adeptoj de volapuko hodiaŭ. Laŭ la rezultoj de mia enketo, ne estas pli ol dek individuoj, loĝantaj en Anglio, Brazilo, Francio, Hispanio kaj Nederlando. Estas mirinde, ke preskaŭ ĉiu **volapükaflen** (amiko de volapuko) kapablas komunikiĝi ankaŭ en Esperanto. Ĉi-jare, okaze de la jarcenta festo, kelkaj fidelaj uzantoj de volapuko faras klopodojn por atentigi la mondon pri la kontribuaĵo de la badena prelato al la internacilingva movado, sed ili mem ĝenerale ne okupiĝas pri seriozaj esploroj rilate sian movadon kaj lingvon. Tiuj, kiuj entreprenas esploron pri la historio, sociologio kaj lingvistiko de volapuko estas — kredu tion aŭ ne — esperantistoj!

Volapuko naskiĝis en 1879, apogeis en 1889, agoniis en la fruaj jaroj de la 20a jc., reenkarniĝis en 1931 kaj hodiaŭ, grizhara kaj centjara, ĝi spitas la abismon de forgeso.

Bernard Golden

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A East-combe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

Pola superrigardo

SE ONI VOLAS krei al si bildon pri la agado de iu landa sekcio, kutime necesas trafosi tutan monton de paperaĵoj. En la kazo de Pola Esperanto-Junularo tian taskon multe faciligas ampleksa raporto de Tomasz Jan Kudrewicz, kiu donas superrigardon de la tuta junulara agado en Pollando dum la laborjaro 1978/79.

Krom Pola Esperanto-Junularo, landa sekcio de TEJO, aktivas en tiu lando ankaŭ Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK), kiu kunlaboras kun TEJO. Inter la aranĝoj de la du polaj junularaj organizaĵoj aparte men-ciindas seminario de PSEK, okazinta en marto, pri la temo "Esperanto serve al la junularo". Ĝi unuavice celis la junularajn gvidantojn kaj allogis i.a. partoprenintojn el Rumanio, reprezentanton de la junulara fakto de SAT. Nome de TEJO partoprenis Ian Tarrant. Laŭ la raporto de Kudrewicz, poloj favoras "ciklajn" aranĝojn, ĉar ili "tradicieiĝinte, vekas pli grandan interesiĝon". Tiaj estas la unuaaprilaj ralioj de PEJ, interlingvistikaj seminarioj de PSEK kaj skoltaj someraj tendaroj. PEJ okazigas regule specialajn feriajn kunvenojn por la komencantoj. Ĉiuj aranĝoj de PEJ kaj plimulto de tiuj de PSEK estas malfermaj ankaŭ por la eksterlandanoj.

VARBADO:

Kiel kaj kien

LEGANTE nian majan numeron, vi eventuale rimarkis du erojn sub malsamaj rubrikoj, sed eble ne ligis ilin unu al la alia. Sur la TEJO-paĝo ni anoncis la sesion "Varbato" en la Internacia Junulara Kongreso (IJK), kaj sub "Informado" (p.96) oni skribis pri la nova varbfolio de TEJO. Temas en ambaŭ kazoj pri la klopodoj de Amri Wandel (Israelo), TEJO-estrarano pri varbado, evoluigi la agadon en sia fako.

Amri estas homo kun neortodoksa sinteno al la varbpolitiko. Li ne timas agnoski la malfortojn de nia nuna pozicio: la foja manko de impulso kaj la malfacile rompebla "eterna cirklo". Li tamen havas inspirajn ideojn pri varbado en diversaj medioj. Ni citas el interna dokumento, kiun ni lastatempe ricevis de Amri:

"Kiel do aspektas la estonteco de nia Movado? La respondo forte dependas de nia estonta agado: kie, kiel kaj kiom ni informos kaj disvastigos la aferon; kiom vastan kaj varian publikon ni atingos. Tial la agado, kiu celas al plivastigo de la kono kaj uzo de la Internacia Lingvo devas esti **prioritata**. Ĝi devas celi la ne-

esperantistan medion je ĉiuj niveloj kaj atingi amasojn. Tradicie, la agado de la tutmondaj organizaĵoj estas ĉefe sur la tereno de interna varbado (ekzemple: varbado por TEJO inter esperantistaj gejunuloj), kaj varbado de neesperantistoj estas pli tasko de la lokaj grupoj; sed tio ne estas nepra divido. La plej grava tasko estas amasa informado al la ekstera mondo kaj instigado al tia informado. Tiu konkludo signife inspiris la lastatempan agadon de TEJO.

Ambicia longperspektiva projekto estas eldoni gvidilon, 'principaron', kiu poste fariĝos manlibro traktanta rimedojn kaj problemojn de varbado en la junulara medio. Tamen, oni ne neglektas la internan varbadon, por kio TEJO produktis la vivecan faldfolion *Kunvenoj*. La planoj estas ankoraŭ multaj. Ni esperu, ke la iniciato de la lasta tempo influos kaj disvastiĝos malsupren en la piramido: al la landaj organizaĵoj, lokaj grupoj, ĝis la individua agemulo. Nur tiel estiĝos grandskala kaj kohera agado."

"Varbato" daŭros nur kelke da horoj dum la 35a IJK. Pli vasta debato pri la varbado devas esti konstanta kaj partoprenata de ĉiuj aktivuloj. Sed ni ne nur debatu, ni **agu**, provante en la praktiko la ideojn kaj konsilojn, kiujn prilaboras Amri Wandel kaj lia komisiono. ij

Ankaŭ norvegoj

DUM la 46a Norvega Esperanto-Kongreso en Sauda, inter la 2a kaj 4a de junio ĉi-jare, fondiĝis junulara sekcio de Norvega Esperantista Ligo. "La celo de la nova sekcio", skribas ties prezidanto Ove Kjønsvik (maldekstre sur nia foto), "estas konigi kaj disvastigi Esperanton inter la gejunuloj en Norvegio." Kjønsvik kaj aliaj estraranoj de la sekcio (apud li, de maldekstre): Tone Irene Lindemark, Torkel Magne Liland kaj Stella de Caspary, planas organizi renkontiĝojn kaj kunlabori kun alilandaj junularaj sekcioj. Norvega



Esperantista Ligo baldaŭ festos sian sepdekjaran jubileon (en 1981) kaj estis jam delonge tempo organizi tie ankaŭ la esperantistan junularon.

Nekrologoj

KURT SCHÖNRICH (1886-1979), honora membro kaj unu el la plej malnovaj anoj de Germana Esperanto-Asocio (GEA), tragike mortis en Wiesbaden (FR Germanio) la 10an de majo. Schönrich lernis Esperanton en 1911, prezidis la lokan Esperanto-grupo dum pli ol 50 jaroj, kaj preskaŭ same longe servis kiel delegito de UEA, kies dumviva membro li estis. Li aktivis en la instruista E-organizaĵo en Germanio kaj en Germana Esperanto-Instituto. En 1957 GEA honoris lin per la medalo "Pro la merito".

VENLO FON (1900-1979), unu el la plej elstaraj ĉinaj esperantistoj dum la lastaj jardekoj, forpasis en Pekino la 5an de februaro. Li lernis Esperanton en 1934 kaj baldaŭ post tio komencis kontribui al la tiama gazeto *Heroldo de Ĉinio*. Post la Ĉina Revolucio, li estris la Esperantan sektion

de Internacia Novaĵa Buroo de Ĉinio, redaktoris en *El popola Ĉinio* kaj Esperantaj sekcioj de Fremdlingva Eldonejo kaj Radio Pekino. Dum la lastaj jaroj li multe laboris pri la Esperanta libroserio de *Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong*. Venlo Fon estas la aŭtoro de la pli ol 900-paĝa *Plena vortaro Esperanta-ĉina* (1952), *Esperanta gramatiko*, 350-paĝa *Elementa kurso de Esperanto* (4a eld., 1964) kaj aliaj ĉinaj lerniloj de Esperanto.

DUŠAN JENECKOV (1921-1979) mortis la 2an de majo en Novi Sad (Jugoslavio). Li estis elstara aktivulo en pluraj sociaj organizaĵoj kaj dum la lastaj jaroj plenumis diplomatan oficon en Bruselo. En la Esperantomovado li aktivis de post 1952: prezidis lokan E-societon, kunfondis kaj prezidis regionan E-organizaĵon kaj dum kelkaj jaroj estis vicprezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo.

Ĉinio

- La 1-an de majo ĉi-jare en Ĉinio fondiĝis la unua provinca movada organizaĵo — Hubei Esperanto-Asocio. Ĉina Esperanto-Ligo lastatempe dungis profesiajn oficistojn por sia sidejo en Pekino, kio certe helpas al pli rapida revigliĝo de la Esperantomovado en tiu lando.

Kostariko

- Antaŭ du jaroj (v. nian numeron de februaro 1977, p. 36) ni menciis la unuajn Esperanto-kursojn en la mezamerika lando Kostariko. Novaj informoj de tie parolas pri du pliaj grupoj, kiuj lastatempe eklernis la Internacian Lingvon. Skribu (kaj helpu per sendo de libroj) al la instruanto: ing. Carlos Salazar, Apartado 72, San Isidro de el General, Kostariko.

Irano

- Revigliĝas la granda laboro por Esperanto en tiu lando. Ankoraŭ ne ĉiuj, sed tamen pluraj el la multaj kursoj de la Internacia Lingvo en la Universitato de Teherano jam rekomenciĝis. Krome, la Libroservo de UEA nun traktas eksporton de 500 lernolibroj por infanoj, ĉar oni planas instrui Esperanton en pluraj elementaj lernejoj de la irana ĉefurbo.

Koreo

- Tridek gejunuloj partoprenis 3-tagan renkontiĝon en Songdoŭon, komence de junio. En la kadro de tiu aranĝo — la 4a Tritaga Universitato — funkciis kvar Esperanto-kursoj, inter ili ankaŭ tiu por la kursgvidantoj.

Loke

Pollando

- En la serio de polaj moneroj sub la nomo "Grandaj poloj", antaŭ du monatoj aperis arĝenta 100-zlota monero kun portreto de d-ro L.L. Zamenhof. Unuflanke de la monero aperas la blazono de Pollando kaj aliaj kutimaj indikoj de la Pola Nacia Banko. Sur la flanko kun portreto de Zamenhof, rigardanta maldekstren, troviĝas ĉirkaŭa surskribo "Ludwik Zamenhof 1859-1917". La monero pezas 16,5 gramojn kaj havas diametron de 32 milimetroj. Ĝi estis emisiita en la malgranda eldonkvanto de 30 mil ekzempleroj kaj certe fariĝos numismatika raraĵo. La moneron projektis Stanisława Watróbska, kaj ĝin produktis la Ŝtata Monfarejo en Varsovio.

Aŭstralio

- En aprilo kaj majo ĉi-jare Ralph Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, estis gastprofesoro en la Universitato de Tasmanio, en Hobarto. La 23an de aprilo, kune kun tasmania parlamentano Mac Lefevre, Harry transdonis 350 librojn al la Ŝtata Regiona Biblioteko

en Launceston, por starigi Esperantofakon de la biblioteko. Al tiu evento dediĉiĝis televida intervjuo kaj raportoj en la tasmania gazetaro. Komence de majo Harry dufoje prelegis por la studentoj de la Tasmania Universitato, laŭ iniciato de studentoj mem kaj helpo de UEA-delegito E. Loozits.

Akademio

- Post la morto de Kalocsay kaj Tárkony kaj demisio de Atanasov kaj Vilborg, okazis la kutima renovigo de triono de la membraro de la Akademio de Esperanto. Krom la reelektitaj akademianoj (vidu la liston en la Jarlibro 1979, p. 56), novaj membroj de la Akademio fariĝis: Albert Goodheir (Skotlando), Fabrizio Pennacchietti (Italio), Claude Piron (Svislando) kaj Baldur Ragnarsson (Islando). Oni atendas baldaŭajn elektojn de la novaj estraroj de la Akademio (prezidanto,

vicprezidantoj, sekretario kaj direktoroj de la sekcioj pri: bibliografio, gramatiko, literaturo, fonetiko, teknikaj vortaroj kaj ĝenerala vortaro).

Lingvoproblemo

- "Lingvo: Baro aŭ maniero de mem-difino", tio estas la titolo de la kontribuado de d-ro H. Tonkin al la debato pri "Baroj al internacia politika identeco". La debato okazis en Vaŝingtono, inter la 24a kaj 26a de majo, en la kadro de la jara kunveno de Internacia Societo de Politika Psikologio. La kontribuado

Fake

larĝe traktas la rolon de la lingva diverseco en la nuntempaj internaciaj rilatoj kaj plurloke atentigas pri la Internacia Lingvo kiel efika plenumanto de la rolo de internacia komunikilo.

Sporto

- Laŭ la numero 3/79 de la hungarlingva revuo *Világ és nyelv* (Mondo kaj lingvo), pluraj hungaraj kaj sovetaj sportistoj forte spertas la lingvoproblemon en siaj internaciaj konkuroj. Ĉiuj intervjuitoj favoras Esperanton kaj subtenus ĝian utiligon dum la Olimpikoj. La revuo, sendube la plej bona nacilingva informilo pri Esperanto kaj la lingvoproblemo en la nuntempa Esperanto-movado, intervjuis i.a. jenajn gesportistojn: Ildikó Tordasi (florelistino, olimpika ĉampiono), Zoltán Magyar (gimnasto, olimpika kaj monda ĉampiono), Galina Prozumenščikova (olimpika ĉampiono en naĝado), Anatolij Karpov (mondĉampiono en ŝako).

- Ĉirkaŭ 200 partoprenantoj de internacia atletika renkontiĝo en Torino (Italio), la 8an kaj 9an de julio ĉi-jare, ricevis en sia dokumentujo ankaŭ specialan eldonon de la sporta konversacilibreto *Saluton amiko!*. La broŝuron, kun la tekstoj en la angla, Esperanto, franca kaj itala, pretigis Michela Lipari kaj Gianfranco Polerani, UEA-komisiito pri sporto. Partoprenis sportistoj el Italio, Kanado, Kenjo kaj Pollando.

Radio

- En unu el siaj lastatempaj cirkuleroj, la redaktoro de la Esperantaj elsendoj de Radio Romo konstatas, ke la nombro de la leteroj de la aŭskultantoj de tiu programo konsiderinde malkreskis kompare kun la antaŭa jaro. Tion eventuale kaŭzis la samtempeco de la elsendoj kun tiuj de Vatikana Radio. Tamen, necesas refoje memori ankaŭ niajn legantojn, ke la ekzisto de ĉiu unuopa Esperanta radioprogramo esence dependas de la reagoj al ĝi. Rerigardu tial al nia maja numero (p. 100), kie aperas la kompleta tabelo (kun adresoj) de ĉiuj Esperantaj radioprogramoj.

Tradukoj

- En la konkurso por literaturaj tradukoj el la nederlanda lingvo en Esperanton, aranĝita okaze de la Nederlanda Esperanto-Kongreso, komence de aprilo ĉi-jare, la premiojn gajnis, por poezio: Punt, Makink kaj Goodheir, dum en la proza branĉo la plej sukcesaj estis Roelofs, Bruins kaj grupo el Amersfoort.


Kolektantoj

- En cirkulero, dissendita komence de majo al la adresoj de la redaktoroj de diversaj bultenoj pri la kolektado de filatelaĵoj, libroj, periodaĵoj, fotoj, diskoj, sonbendoj ktp., Marinko Gjivoje (P.p. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio) konstatas mankon de kunlaboro inter la

aktivuloj sur ĉi tiu movada kampo. Li instigas al fondo de unueca organizaĵo, kun sekcioj por specifaj fakoj. Tiurilataj diskutoj devus okazi en la kadro de la 64a UK en Lucerno.

Rotario

- *Le rotarien*, monata revuo de la Asocio de Francaj Rotarianoj, en sia n-ro 316 de majo 1979 dediĉis 24-paĝan sekcion al Esperanto. Ĝi prezentas la Internacian Lingvon el




diversaj vidpunktoj, kun speciala atento al la ligoj inter Rotario kaj Esperanto (tre bona artikolo de la ĉefredaktoro Marc Levin) kaj longa eseo de Claude Piron pri la tradukado de kanzonoj Esperanten. Pluraj el tiuj franclingvaj artikoloj aperas kun ampleksaj resumoj en Esperanto. La tuto estas riĉe ilustrita, en bela grafika prezento kaj luksa preso. Tiu revusekcio celas malfermi diskuton inter la francaj rotarianoj.

Persone

Blanke

- Laŭ invito de Bulgara Esperantista Asocio, d-ro Detlev Blanke (Germana DR) prelegis fine de aprilo en la bulgaraj urboj Plovdiv kaj Sofio. Krom la prelegoj (pri sia patrolando kaj ties Esperanto-movado) en la lokaj E-societoj de la du urboj, d-ro Blanke parolis ankaŭ en la universitatoj de Plovdiv (temo: "Rezultoj de interlingvistiko: La raciigo de internacia lingva komunikado") kaj Sofio ("Interlingvistiko kaj interna-



- **Sporto:** La fakto, ke en Split (Jugoslavio) haste konstruiĝas la urba stadiono apenaŭ estas novaĵo por nia revuo. Tamen, la organizantoj de la Okaj Mediteraneaj Ludoj, por 3 000 sportistoj el 15 landoj, meze de septembro ĉi-jare en Split, zorgis, ke ilia laboro estu novaĵo ankaŭ por ni. La gazetara servo de la granda sporta aranĝo komencis eldonadi siajn bultenojn — jam aperis du — ankaŭ en la Internacia Lingvo. Tio ja estas novaĵo, bela kaj salutinda.

ciaj lingvoj"). La unuan el tiuj prelegoj ĉeestis 150, la duan 120 gestudentoj. En neesperantista Sciencfikcia Klubo en Plovdiv, d-ro Blanke gvidis diskuton pri la temo "La lingvo de la estonto – la estonto de la lingvo".

Oljanov

- S-ro Violin Oljanov, komitatano de UEA, estrarano de Bulgara Esperantista Asocio, prezidanto de Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj kaj ĉefredaktoro de "Paco", ĵus ricevis altrangan ŝtatan ordenon pro siaj meritoj en la socia laboro, inkluzive la multflankan aktivecon en la Esperanto-movado. La distingo ligiĝis al la 60a datreveno de s-ro Oljanov.

ekzameno
 Redaktas: B. Golden,
 Csikász u. 11.III.3
 H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 29

(pri la demando vidu nian majan numeron)

a. *Hamleto, reĝido de Danujo* de William Shakespeare, tradukita de d-ro L.L. Zamenhof (1894). *Hamleto, princo de Danujo* de William

Shakespeare, tradukita de L.N.M. Newell (1964).

b. *La tragedio de l'homo* de Imre Madách, tradukita de Kolomano Kalocsay (1924 kaj 1965).

c. *Sonĝo de someromeza nokto* de William Shakespeare, tradukita de Louise Briggs (1921). *Somermez-nokta sonĝo*, de William Shakespeare, tradukita de Kolomano Kalocsay (1967).

ĉ. *Sonĝe sub pomarbo* de Julio Baghy (1958).

d. *Ginevra* de Edmond Privat (1910).

e. *Natan la saĝulo* de Gotthold Ephraim Lessing, tradukita de Karl Minor (1923).

f. *Jozefo* de J.D. Applebaum (1957).

g. *Mazepa* de Julius Słowacki, tradukita de Antoni Grabowski (1912).

ĝ. *Ivan la Sesa* de Geraldo Mattos (1953).

h. *La revizoro* de Nikolaj Vasileviĉ Gogol, tradukita de d-ro L.L. Zamenhof (1907), represita (1978).

RIMARKO: Pro la abundo de aliaj materialoj en ĉi tiu revunumero, ni ne aperigas ĉi-foje novan demandon de "Ekzameno E". Kiel ni jam foje atentigis, ĉi tiu rubriko celas instrui kaj lernigi, pro tio, kiel en ĉiuj lernejoj, foje necesas ferii. La demando 30 aperos en nia oktobra numero.

Oficiale informilo

N-ro 527

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Hispanio: Pere Saumell i Villa. Japanio: J. Kibe. Usono: F. Nietert.

SOCIETO ZAMENHOF 1979

ARG: 185 Curt J. Milkuschütz. BELG: 186 Clara Peeters. FINN: 187 Liisi Oterma. FRANC: 188 Jack-André Rousseau; 189 Yvette Vierre. HISP: 190 A. Enriques de Salamanca; 191 Josep Castelltort i Riba. SVED: 192 Sygne Stenström. US: 193 Milton C. Brown; 194 Rose Norlund.

DONACIOJ 1979 (Gld.) ĝis la 31a de majo

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: R. Moerbeek 200,00 (por Latin-Ameriko). Sumo ĉi-jara 326,09. FONDAĴO CANUTO: Nederlando: F. Zeiler 55,00. Sumo ĉi-jara 371,62.

ĜENERALA KASO: Nederlando: H. Veenstra 1 000,00. Usono: J. Novak 36,22. Diversaj malgrandaj 18,29. Sumo ĉi-jara 3 118,13.

PATRONOJ DE TEJO: 20 Margrete Landmark, Norvegio. 21 Joŝiko Tacumi, Japanio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Esperanto en radio

Pri aliaj detaloj de "Esperanto en radio" vidu nian numeron de majo 1979, paĝo 100, kie aperas kompleta tabelo de Esperantaj radioelsendoj.

ARGENTINO: La stacio Radio Nacional Córdoba (LRA7), ondo 400m (750kHz), ĉiumerkrede je 21.15h GMT disaŭdigas informojn pri Esperanto en la hispana lingvo, pere de dialogitaj prelegetoj. La temoj ĝis nun dissenditaj estas: historio de la primitivaj lingvoj, eraroj en la tradukoj, deveno de Esperanto kaj ĝia gramatiko, Esperanto en la monda kulturo, literaturo kaj traduko de famaj verkoj, propra literaturo de Esperanto, la junuloj: TEJO kaj ĝia historio, la kongresoj de Esperanto lokaj kaj internaciaj, perspektivoj de Esperanto. Prelegas s-ino Rossina Langhi de Zaninetti. Aŭdebleco ĝis 500km. Korespondaĵojn oni sendu al Kordoba Esperanto-Asocio, C. Correos 456, Córdoba, Argentino.

AŬSTRA RADIO: Kvankam tagoj

kaj horoj restis la samaj, kelkaj ŝanĝoj okazis pri ondlongoj kaj konsekvence pri aŭdebleco. La dimanĉa programo estas disaŭdigata per ondoj 48.74m (6155kHz) por Eŭropo, 19.66m (15260kHz) por Norda Ameriko, 13.90m (21575kHz) por Aŭstralio kaj Azio; la sabata programo, per ondoj 48.74m (6155kHz) kaj 30.71m (9770kHz) por Eŭropo, 19.28m (15560kHz) por Proksima Oriento; la ĵaŭda programo, nur loke aŭdebla, per ondo 89.8MHz (mod. frekv.). Raportoj pri aŭskultado, ĉiam bonvenaj, estas sendotaj al O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrujo. **IBRA-RADIO** nun prezentas sian Esperantan programon "La ĝoja espero" per ondo 31.48m (9530kHz) el Radio Mediteranea, Malto. Sama horo ĉiun mardon, de 20.30 ĝis

La Centra Oficejo de UEA
 ESTOS FERMITA
 inter 1979 07 25 kaj 08 05

Pro la kongresaj vojaĝoj kaj libertempoj de geoficistoj, la CO de UEA estos fermita inter la 25a de julio kaj 5a de aŭgusto. Generale dum julio kaj aŭgusto oni bonvolu skribi al la Oficejo nur se temas pri urgaj aferoj.

20.45. Korespondaĵojn oni sendu al IBRA Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.

POLA RADIO: De majo ĝis novembro la tri duonhoraj ĉiutagaj programoj estas dissendataj per la jenaj ondoj: de 05.00 ĝis 05.30h, 200m (1503kHz), 75.84m (3955kHz), 50.04m (5995kHz), 48.90m (6135kHz), 41.27m (7270kHz); de 15.30 ĝis 16.00h, 42.11m (7125kHz), 31.50m (9525kHz); de 21.30 ĝis 22.00h, 200m (1503kHz), 75.84m (3955kHz), 50.04m (5995kHz), 49.22m (6095kHz), 41.18m (7285kHz). Sendante vian raporton pri aŭskultado al Pola Radio, Esperanto-redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando, ne forgesu peti

la informfoliojn priprogramo kaj venonta konkurso, kies unua premio estas dektaga restado en Pollando.

SVISA RADIO: La programoj estas daŭre dissendataj lunde, ĵaŭde kaj sabate de 18.00 ĝis 18.15 kaj de 22.00 ĝis 22.15h per ondoj 75.28m (3985kHz), 48.66m (6165kHz), 31.46m (9535kHz). Krome, la pli malfrua disaŭdigo estas ankaŭ kaptebla per ondoj 19.83m (15125kHz), 16.92m (17730kHz), 16.83m (17830kHz), 13.90m (21585kHz), kiuj estas speciale direktitaj al Afriko; la lasta ankaŭ al Sud-Ameriko. Raportoj, kritikoj, sugestoj sendotaj al Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern, Svislando, estas bonvenaj.

Dezirataj interesaj informoj pri registrejoj de akcikompanioj diverslande. Ĉeestos en Lucerno. Kontakto: COX, Central Station, Tunbridge Wells, Kent, Anglujo.

Radioamatoroj, EA-8-IS, Box 33, La Laguna – Tenerife, Kanariaj Insuloj, deziras starigi kompletan adresaron internacian de radioamatoroj esperantistoj. Bv. tuj sendi vian adreson!

60-jara sveda oficisto deziras korespondi kun esperantistoj pri ĉiuj temoj: s-ro Jan Vedevid, Poste restante, S-401 01 Göteborg 1, Svedio.

Fraŭlo 27-jara, elektristo, deziras korespondi tutmonde, kolektas bildkartojn. Adreso: Karim Ŝaripov, str. Burovnikov 2-1, pos. Pridorojnij, SU-466412 Gurjev, Soveta Unio.

Serĉas anglan familion por gastigi du francajn knabojn 17-jarajn, du semajnojn, dum aŭgusto. Reciprokas gastigon. S-ino Tissier, 25 rue Regnard, F-21100 Dijon, Francio.

Informigu objektive pri la optimale modernigita ortografio de Esperanto! – OEO, 24 avenue Riedenheim, F-68100 Mulhouse, Francio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto, numero aŭ mallongigo kostas 0,75 guldenojn aŭ egalvaloron (= unu internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem.

Novajletero pri virina agado? Interesatoj skribu (laŭeble sendante respondkuponojn) al: Anna Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando.



Mi estas 10-jara knabino, kiu deziras korespondi kun la tuta mondo. Se vi havas similajn dezirojn, skribu

al mia adreso: Ellen Åberg, Tycho Brahes 9.II, S-415 17 Göteborg, Svedio.

Scipovantojn de sanskrito serĉas: Andrej V. Jakovlev, Kalajevskaja 5-212, Moskva, Soveta Unio.

Kiel helpi blindulojn? Legu "Ne tie sed ĉi tie!" (H. van Dyck), akireblan en la Kongresa Libroservo aŭ ĉe UEA

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio aŭ Greklando, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Plena gramatiko de Esperanto, de K. Kalocsay - G. Waringhien, 2a kajero, III kompletigita eldono 1964. Certa kvanto da ĝi troviĝas ĉe: Triesta Esperanto-Asocio, via Trento 1, I-34132 Trieste, Italio. Prezo: 6 gld., plus sendokostoj. Por mendo de pli ol kvin ekzempleroj oni ricevas 10% da rabato.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!


Por Esperanto-ekspozicio dum urbaj kulturaj tagoj, komence de septembro, Esperanto Unuiĝo de Næstved volonte akceptos poŝtkartojn, broŝurojn k.a. esperantaĵojn. Bv. adresi al: Inge Kromann Jensen, Bogensevej 43, DK-4700 Næstved, Danlando.

Leteresperon havos E-klubo de Norsborg. Respondo garantiata. Skribu al: s-ro Kiviluoto, Klövernägen 5, 2 tr., S-145 67 Norsborg, Svedio.

Naturistoj/nudistoj, ankaŭ en ne-transpagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn ĉe: H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Kio estas la kurzo por la Stelo? La respondon vi trovos en la Bulteno de Universala Ligo.

Carlo Carena (elp. Karlo Karena) forpasis je la aĝo de 87 jaroj en Voghera (elp. Vogera). Homo simpla, ĉiam ĝentila, aktiva, li multe laboradis por la movado. Multaj esperantistoj longe rememoros lin kun granda simpatio.



Carena esperantistiĝis en la malproksima jaro 1922. La Itala Esperanto-Federacio kaj la Esperanta Grupo de Voghera rememoros lin kun ĉagreno kaj kortuŝo. Fidela iniciatinto kaj kunlaboranto; Esperanto estis por li preskaŭ religio.



Spite la altan prezon, preskaŭ du mil esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikantan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitetis ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopeo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurusu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lasta milo de la posedantoj!

esperanto en perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

Esperantaj Francaj Eldonoj:

Verkoj de L.L. Zamenhof

Fundamento de Esperanto, kun aldonoj kaj klarigoj. Bindita 13,20 gld., bruŝurita 10,80 gld., 355 paĝoj.

Lingvaj respondoj. 144p. Bind. 10,50; broŝ. 8,40 gld.

Marta de E. Orzeszko, trad. de L.L. Zamenhof. 213 paĝoj, ilustrita, bindita. 10,80 gld.

Hamleto de Ŝekspiro, traduko de L.L. Zamenhof. 206p. Ilustrita, bindita. 9,60 gld.

De la sama eldonejo: **Gvidlibro tra Paris**, de Julieta. 249 paĝoj, kun fotoj kaj urboplanoj; 8,70 gld. **La kunprinclando Andoro**, de Bacquer. 60 fotoj, 73p.; 6,00 gld. **Sen eliro**; **La respektema p...**, de Sartre, trad. Roger Bernard. 111p. 5,70 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda

Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

Subtenu la tutmondigon de Esperanto per donaco al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la CO de UEA

Fondaĵo Azio-Afriko

Savu nin

per starigo de la SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/4

Ĉu mondpacigo estas iluzio, revo aŭ utopio? Tio vere estas utopio! Sed utopio frata al la miljara sopiro pri homa flugo, pri supreniro al la Luno, pri submara navigado, pri ekstermo de pesto k.s. Revoj neefektiveblaj, asertis pompe dum multaj jarcentoj la fakaj malspertuloj mistrudante sian oceanan nescion. Tamen, per fantazio subjungita al konkreteco, per scienca kaj teknika vojoj, venis la tago en kiu tiuj utopioj estis realigitaj. Ankaŭ por la mondpaco venos la tago de realiĝo, kondiĉe ke ni iru laŭ la sama vojo scienca, kondiĉe ke oni ne insistu freneze pri la misrekono kaj surtronigo de fia unuopula faka malsperto.


♦ Esp/5

Bloki la solvon de mondpaca problemo, ĉu per malico, ĉu per trudo aŭ perfido de profesieco, ĉu per evitigo de ĝustatempa agado (tiel pro malsperteco kiel pro malfrua reago), ĉio ĉi estas altgrade sama krima konduto. Tute ne senkulpigas vin la deklaro, ke vi agis noble. Sed... Kiom valoris via opinio? La okazintaj ploroj kaj viktimoj atestas, ke vi fanfarone supertaksis vian fakan kompetentecon. Ili

atestas, ke vi tute ne serĉis la direktivojn de sufiĉe altranga spertulo, kio estis via devo, aŭ ke vi ribelis kontraŭ tiaj direktivoj, plenkulpe. La amaso de viaj viktimoj kondamnas vin, bonintenculo!

♦ Esp/6

La baza afero, kiu blokis la efektivigon de vere reala tutmonda registaro, tiel en 1919 kiel en 1945, estis la nesolvita problemo: kiu formo de mondregistaro? Vere, ĉiu ajn ĝistima speco estis tute ne akceptebla por la racio, ĉar sovaĝspeca. Kaj, neniu altranga decidanto emis al la risko esti la neevitebla morgaŭa viktimo de tiu nova, pli ampleksa, tamen sovaĝa, futura registaro. Neniu tiam ankoraŭ estis elpensinta la SUPERDEMOKRATION. Neniu estis konjektinta, spite la averton de S-ta Aŭgusteno, ke la politiko bezonas urĝan malsovaĝigon. Jen de kie fontas, inter la aliaj masakroj, la ekstermo de ses milionoj da hebreoj. Priatentu! La tiama pordo al la amasbuĉado estas ankaŭ nun komplete aperta.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIAO

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

ROMULO GALLEGOS:

DOÑA BÁRBARA

fama sudamerika romano en la traduko de F. de Diego. Caracas: VEA, 1975. ISBN 84 399 2885 8. 16,20 gld.

UEA estas nun la ĉefdistribuanto de la Esperanta eldono.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia arta prozo kaj riĉigis nian lingvon per libro kies ĝuado en Esperanto ne estas sub tiu de la legado en la hispanlingva originalo. Kelkloke la estetika ĝuo estas pli diafana kaj senpera en la tradukita teksto, ol en la originala, dank' al la brava manipulado de la latentajoj en Esperanto kaj al la suverena agordado de ĉi ties esprimrimedoj." Juan Régulo

VOLONTULA SERVO DE UEA:

Aliĝu al la movada lernejo

Dum kelkaj lastaj jaroj, ĉ. 15 personoj el deko da landoj de kvar kontinentoj frekventis tiun unikan lernejon de la Esperanto-movado. Jes, oni helpas kaj serioze laboras tie. Sed, krome, ĉiuj ĝisnunaj labrintoj lernis amason da aferoj pri la Movado kaj komencis orientiĝi en kaj pri ĝi. Pluraj lernis tutajn metiojn: kompostado, teknika redaktado, librovendado, fotado ktp.

Ĉu vi ŝatus aliĝi al tiu lernejo? Ni nun denove serĉas volontulojn, principe por unujara periodo. Memoru tamen, ke necesas esti malpli ol 29-jara, bone koni Esperanton, havi tajpkapablon kaj esti lernema. Pri detaloj skribu baldaŭ al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



TEO JUNG estas verŝajne la plej elstara nomo en la historio de la esperantlingva gazetaro. Kun entute 1330 numeroj de "Heroldo de Esperanto" (antaŭe "Esperanto triumfonta"), inter 1920 kaj 1961, Jung ankoraŭ longe tenos tiun malfacile supereblan redaktan rekordon. Jung eble estas ankaŭ la unua homo, kiu gajnis sian pension ekskluzive per la Esperanta laboro. Tiu homo nun aperigas siajn memuarojn, sian propran "Libro de Teo". Kaj tio ne estas okazaj notoj de hazardulo sed sistema registrado de profesia observanto. La aŭtoro havas multon por diri, ni multon por lerni. Krome, la tuto legiĝas kvazaŭ ekscita, belstila romano pri unu eksterordinara, sindediĉa kaj fruktodona vivo.

ĈIU ĈIUN; Sep jardekojn en la Esperanto-movado; Memoroj de 86-jara optimisto, Teo Jung (1892 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 400p. Ilustrita. 21cm. Movado 8. ISBN 90 6336 011 8. Prezo: 36,00 guldenoj.



STAFETO

TK/Stafeto, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio. Ĉiujn TK-eldonaĵojn liveras ankaŭ Libro servo de UEA.